

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
SIERPIEŃ 1927 AUGUSTO
WRZESIEŃ SEPTEMBRO

Nr. 8.—9. N-o

ZE ZJAZDU JUBILEUSZOWEGO GDAŃSK—WARSZAWA.

PIERWSZE zapytanie, jakie stawia ktoś kto nie widział Zjazdu jest: czy Zjazd się udał? — Nie było, odpowiemy, ani jednego zjazdu, któryby się nie udał. Były lepsze i gorsze, ale zawsze były udane. I Gdański Zjazd się udał, bo było jednak około 1000 uczestników, którzy, jak zwykle poczuli się tym jednym i jedynym w świecie narodem mówiącym językiem wspólnym, jakkolwiek każdy czuł, że ma swój osobny bliższy naród własny, do którego należy prawem urodzenia. Uczestników Zjazdu mogło być więcej. Zdaje się, że temu na przeszkodzie stanęła zbyt wysoka wkładka członkowska, która na przyszłość winna stać się niższą.

Staje się coraz bardziej widocznem, że potrzeba jednego języka porozumiewawczego przenika szerokie sfery społeczeństwa. Już w Edynburgu było to wyraźnie zaznaczone. Ta zwarta falanga inteligencji wszechświatowej przybyła z 45 krajów, używając języka nietylko w mowie potocznej między sobą, ale dążąc coraz więcej do wyjścia w szerszy świat i widząc potrzebę ujednostajnienia języka wiedzy fachowej — zwłaszcza na zjazdach wielojęzycznych: jest to objaw znamieny dla chwili przełomowej w jakiej się obecnie znajdujemy.

Zapoczątkowany w Genewie t. zw. letni Uniwersytet (wykłady z różnych działów wiedzy) podczas Zjazdu Gdańskiego cieszy się wyjątkową frekwencją, pomimo iż tematy nie będą wcale wykładami popularnemi dla szerszej publiczności i pomimo, że ogłoszenia wykładów niezbyt szczęśliwie były propagowane, a same wykłady w odległym od miasta gmachu Politechniki urządzone. Wykład niżej podpisanego mający bardzo nieinteresujący tytuł: ujednostajnienie metod higieny i profilaktyki zgromadził z górą 200 słuchaczy.

Jedno byłoby do życzenia, co też zostało zaznaczone na ogólnem posiedzeniu I. C. K.: prelegenci powinni postarać się o dobrą wymowę, co niezawsze ma miejsce. Najbardziej w tym kierunku raził wykład jednego z profesorów połud-

niowo niemieckich, który stale wymawiał b, i t, w brzmieniu miękkim, jak to jest tam w zwyczaju a co przy esperancie nie powinno mieć miejsca.

Zebrania międzynarod. związku naukowego Int. Scienca Asocio i podobnie zebrania lekarskie, które odbywały się znów w innym punkcie miasta koło Motławy w Towarzystwie przyrodników, co mocno utrudniało zebrania, dowiodły, że czas już wielki, ażeby rozpocząć Zjazdy specjalne zwłaszcza lekarskie, które by się odbywały w tym jednym języku. Na zjeździe naukowym, w którym wzięło udział duże grono osób z różnych krajów omawiano kilka doniosłych zagadnień naukowych, zaś prof. Oishi z Tokio w Japonji demonstrował 1-szą część swej pracy meteorologicznej w obserwatorjum w Tateno wykonanej. Jest to duży tom o 210 str. napisany wyłącznie po esperancku, tylko tytuł dzieła po japońsku.

Delegat angielski Inż. Letchmere-Oertel pełniący obowiązki skarbnika zebrał 48 nowych członków dla Stowarzyszenia odrazu w pierwszych dniach Zjazdu. Wkładka roczna pół dolara daje prawo do otrzymywania biuletynu towarzystwa wydawanego co 2 miesiące.

Jeszcze liczniejszemi były zebrania lekarskie, umiejętnie prowadzone przez prezesa Dra Blasberga. Na 3 posiedzeniach wyłoniła się wielka ilość ciekawego materiału lekarskiego, który mógł być starczyć na wypełnienie ram specjalnego lekarskiego Zjazdu. Obecnych było z górą 100 osób co jest niewątpliwym zaczątkiem Zjazdu ogólnie lekarskiego, który mógłby być niedługo zwołany. Przecież pismo Medicina Revuo ma już 700 abonentów. Połowa zebranych mogła by zadowolnić Zjazd lekarski. Sądzymy też, że tak czynny prezes, jakim jest Dr. Blasberg niedługo Zjazd 1 lekarski zechce zainauguować. Gdańsk jest miastem bardzo ciekawem ze względu na swoją historję; dużo ma pamiątek wspólnych z Polską. Radzimy też każdemu przeczytać uważnie artykuł ks. Kruszyńskiego w jednym z poprzednich numerów „Pola Esp.“ lub w Przewodniku po Polsce w języku Esperanto, który P. E. D. niedawno wydało.

Wycieczkami i zabawami nie będziemy się tutaj zajmować. Zaznaczymy, że ze względu na bliskość polskiego morza, postaraliśmy się w porozumieniu z Sekcją prasową Polskiego Komisarjatu w Gdańsku urządzić wycieczkę dla zwiedzenia nowo budującego się portu w Gdyni. Zebrali się sami znawcy francuscy, angielscy, włoscy i japońscy, którzy z uznaniem oświadczyli się za korzystnem umieszczeniem portu i podnosili jego szybki wzrost w tak krótkim czasie. Wspólny obiad po wycieczce nieco nużącej, na który w Kasynie miejscowem z ramienia Polskiego Komisarjatu zaproszeni zostali uczestnicy wycieczki z sędziwym burmistrzem Stockholmu p. Lindhagenem na czele, pozostawił miłe wrażenie.

Z wielu stron dały się słyszeć głosy, że było nie na miejscu podczas zebrań zjazdowych zbyt silne podnoszenie niemieckości Gdańska. Na cu-

dzoziemcach wywarło to ujemne wrażenie; nikt przecież nie miał zamiaru zaprzeczać niemieckiego charakteru miasta, ani jego wiekowej hanzeatycko-niemieckiej kultury. Ale bicie pięścią w stół przy jednoczesnym mocnym stwierdzeniu, że Gdańsk jest i pozostanie czysto niemieckim — jak to uczynił pewien miejscowy kaznodzieja — wobec pokojowo usposobionych esperantystów przedstawicieli 40 z górą narodów, nie mających żadnego zamiaru występować nieprzychylnie wobec jakiegokolwiek narodowości — było chyba zupełnie zbędne, a robiło wrażenie powiedzmy — nawet pewnej słabości.

Zaznaczyć należy, że nadmierna liczba czysto niemieckich przemówień podczas zebrań również nie odpowiadała charakterowi Zjazdu.

Wielce miłą natomiast i prawdziwie międzynarodową była wizyta u Wysokiego Komisarza p. V. Hammel. Oboje gospodarstwo przyjmowali zebranych gości na podwieczorku w ogrodzie prześlicznej willi. Przyjęciu towarzyszyła dyskretna muzyka wojskowa. Miły nastrój od gospodarzy udzielił się zebrany — czemu dopomogła prześliczna pogoda, która zresztą towarzyszyła całemu Zjazdowi. Wspaniałem było przyjęcie u Polskiego Komisarza p. Ministra Strasburgera, który podniósł znaczenie esperanta dla przyszłej kultury ogólnie ludzkiej i objawił radość z powodu iż Polska staje się w ten sposób dla niej niejako pomostem z powodu, iż wynalazcą jest Dr. Zamenhof w Polsce urodzony. Oddeklamowany pięknie „Mój testament“ Słowackiego w tłumaczeniu J. Tuwima przez p. Grenkamp-Kornfelda zaznajomił obecnych z wielkim polskim poetą.

Po sztywnych, urzędowych przyjęciach i przemówieniach ze strony władz gdańskich, zebrania u Wysokiego Komisarza Ligi Narodów i Polskiego Komisarza były niejako balsamem łagodzącym; potrzebę jego odczuwaliśmy wszyscy uczestnicy tego kongresu, który wyróżnił się dziwnie niemile z pośród innych dotychczas odbytych zjazdów esperanckich. Przecież i P. V. Hammel podniósł niemieckość Gdańska i przemówił w języku niemieckim, zaznaczając, że mówi językiem mieszkańców tego miasta i każdy zrozumiał, że nie mógł on przemawiać innym językiem, bo jest to istotnie język znacznej większości mieszkańców.

Chcąc być bezstronnym zapytywałem innych uczestników zjazdu o ich wrażenia i pokazało się, że w moim poglądzie nie byłem odosobniony: kilku cudzoziemców odniosło to samo wrażenie. Dodać również należy, że mieszkańcy Gdańska nie objawiają tej jakiejś niemiłej odrębności, jaką widać w Senacie i urzędach, co pozwala przypuszczać, że te stosunki się zmienią skoro zrozumianem zostanie, że nikt nie czyha na pozbawienie Gdańszczytan ich niemieckości. Ale Gdańsk musi zrozumieć, że jego całe znaczenie polega na dobrym współżyciu z sąsiadami.

W sprawozdaniu ze zjazdu umieszczonem w Nr. 33 Heroldo de Esperanto, a więc w organie wychodzącym w Niemczech, znajduje się ustęp,

który stwierdza, że bezstronni Niemieccy Esperantyści podzielają te poglądy. Przytaczamy ten ustęp:

Post la solena plantado de la jubilea kverko en la arbaro de Zoppot, la partoprenintoj ree rapidis al la ĉefsidejo de l'kongreso al Pafista Domo en Danzig, por ĉeesti la Jubilean Festvesperon.

Bedaŭrinde ĝi iom seniluziigis, ĉar se eble oni atendis entuziasmigajn jubileajn paroladojn, kiuj malfermus la pordegon al ĝojiga estonteco, oni devis konstati, ke *la plimulto de la oratoroj restis ĉe la Pasinteco*. Estis tute en ordo, ke Dro Feliks Zamenhof memorigis pri sia frato, la genia aŭtoro de Esperanto, kiu bedaŭrinde ne ĝisvivis la plenan sukceson de lia ideo: sed la sekvintaj oratoroj *ne estis bezonintaj ripetu tiom da pasintaĵoj*. Malluma estis la pasinteco, ĝi estis plenigita de malkompreno, interbatalado, fratmortigado: Ni Esperantistoj prefere rigardu la estontecon, tiun estontecon, kiun ni imagas: brilan, pacan, amplenan.

To nawoływanie do rozważnego, wyrozumiałego traktowania teraźniejszego stanu rzeczy jest bardzo znamienne: wskazuje ono, że zgrzyty szowinistyczne, jakie ujawniły się na gdańskim zjeździe, niemile uderzyły esperantystów, nawet po stronie niemieckiej.

Kilka słów należy poświęcić uroczystości posadzenia jubileuszowego dębu w Sopotach. Odbyła się ona przy upalnej pogodzie po południu przed owym, wyżej wspomnianym wieczorem balowym. Przybyło dużo uczestników zjazdu z ziemią z różnych stron świata. Pierwsza złożyła odrobinę ziemi wziętej z nad grobu Ojca P. Dr. Lidia Zamenhofówna. Prezes zjazdu p. Aelterman złożył w imieniu greków ziemię z pod Maratonu, oraz z Aten z pod posągu Pallas Ateńskiej; P. Szapiro z Białegostoku ziemię z domu, gdzie się Zamenhof urodził; różni delegaci złożyli po garści ziemi z różnych krajów, nie brakło nawet Australji.

Do Warszawy zjechało około 300 osób, z tego znaczna przewaga cudzoziemców. Przybyłych gości powitali na dworcu p. Belmont i z ramienia Min. Spr. Zagr. p. Klimecki oraz w imieniu miasta p. Wiceprezydent Rogowicz. Widocznym był wśród przyjezdnych wysoko podniosły nastrój dla mającego nastąpić momentu oddania czci twórcy Esperanta, który od lat 10 przedwcześnie spoczął nie ujrawszy tego rozwoju, jaki osiągnął jego wynalazek. Nad grobem przemawiali liczni mówcy, którzy składając wieńce, wszyscy zgodnie złożyli zarazem hołd pamięci wynalazcy, na polskiej zrodzonemu ziemi*). Niejeden mówca miał łzy w oczach. Prawdziwie wzruszonym czuć się musiał każdy po przemówieniu hiszpana, majora Mangada, gdy tenże z czcią ucałował zimny kamień nagrobka, pod którym spoczęło gorąco miłujące ludzkość serce.

*) Osobno przytaczamy ważniejsze przemówienia.

Nie mniej podniosły nastrój panował wśród obecnych, gdy Dr. Privat Prezes Centralnego Komitetu Międzynarodowego w Genewie składał wieniec u stóp polskiego wieszczą Adama*). Podniósł on w swej mowie, że nikt nie potrafił wznieść się tak wysoko w umiłowaniu całej ludzkości jak Mickiewicz, który wówczas, gdy kajdanami dźwięczące kibitki wiozły na Sybir setki walczących za wolność — potrafił ofiarować jedyny skarb narodu — nienawiść dla wroga — uczuciom wyższym, ogarniającym ludzkość całą. Walki ustaną, gdy Polska wolną będzie, głosił wieszcz. Niechże się spełni teraz Jego prorocstwo! O ile sądzić można, uczestnicy Zjazdu wynieśli z Warszawy wrażenie korzystne. Wielką usługę ma w tem Komitet Urządzący z pp. Essigmanami na czele. Przez cały przeciąg Zjazdu oboje pracowali z wytrwałością godną podziwu.

Znaczna część uczestników przed wyjazdem z Polski podążyła do Białegostoku, gdzie Komitet miejscowy z p. Szapiro urządził uroczystość odsłonięcia tablicy na domu, gdzie się urodził Zamenhof. Na dworcu oczekiwali przybycia gości liczni mieszkańcy z przedstawicielami Województwa, Władz miejscowych i Samorządowych. Orkiestra wojskowa odegrała hymn esperancki, co było miłą niespodzianką dla przybyłych.

Odsłonięcia tablicy na domu urodzenia Zamenhofa, mieszczącym się na ulicy jego nazwisko noszącej dokonał p. Wojewoda Inż. M. Rembowski, przyczem przemówił o korzyściach płynących z wynalazku tego dla ludzkości a pośrednio i dla Polski, jako kraju, w którym urodził się i pracował twórca języka. Przemowę zakończył hymn państwowy, potem hymn Esperancki odegrany przez orkiestrę wojskową.

Wieczorem tegoż dnia odbyła się uroczysta akademія, na drugi dzień odbyło się zwiedzanie miasta i wycieczka do Białowieskiej puszczy.

Kilkudziesięciu uczestników wybrało się do Krakowa. Ci chcieli poznać Polskę i jako tacy, dla nas polaków są najcenniejsi.

W Krakowie oprowadzali ich członkowie Tow. Esperanto: Dr. Blasberg, p. Rosenthalowa, pp. Ziomek, Janczalik, Wiesenberger i inni. Wymienimy kilka nazwisk przybyłych: Inż. Orengo i Arabeno; ks. Giovanni Bruno, Dr. Canuto prof. Medycyny Sądowej z Włoch, Prof. Koderą z Ta-kaoka w Japonji, poseł Setälä z żoną z Finlandji, Sarnell Bratford z Anglii, p. Helsing ze Szwecyi, pp. Balkanyi i Tolnai z Budapesztu, prof. szkoły rol. z Przyrowa Pittner oraz Talpa, Nivelkova z Pragi i inni, razem trzydzieści kilka osób. Była również grupa ks. Wachowskiego złożona z 12 osób z Westfalji; zwiedzała Polskę i Śląsk.

*) Wydał on osobną monografię o Mickiewiczu w języku Esperanto.

KELKAJ RIMARKOJ PRI JUBILEA DANZIGA ESPERANTO KONGRESO.

Se oni demandos ĉu la kongreso sukcesis, ni respondos jese. Cetere ĝis hodiaŭ, oni ne rimarkis kongreson, kiu ne sukcesis. De la unua kongreso en Boulogne ĝis la deknaŭa en Gdańsk-Danzig, oni vidas, ke la ideo de la lingvo, komuna por ĉiuj nacioj de la mondo, malrapide, sed konstante disvastiĝas inter inteligentaro de la mondo. Jam en Edinburgo oni povis konstati, ke eĉ en Britlando kaj en Usono, do en landoj, kie oni ĝis nun kutime ne sentis bezonon lerni aliajn lingvojn, antaŭvidantaj homoj ekkomprenis, ke nuntempa, rapida disvolviĝo de komunikiloj: radio-disaŭdigado, aeroaviado, plirapidiĝinta ritmo de homa vivado, devigas homon serĉi ilojn de pli rapida interkompreno.

Ĝis nun oni ĉiam diradis, ke la lingvo Esperanto estas precipe necesa por malgrandaj nacioj, kies lingvoj havas tro limigitan medion por iĝi studindaj: de nun la afero staras tute alie.

Dum la lasta kongreso tute klare evidentiĝis, ke la ideo de la someraj prelegoj estas tre taŭga por la diskonigo de la lingvo: aŭskultante prelegon, oni iom post iom alkutimiĝas al la praktika aplikado de la lingvo por instruaj celoj: oni vidas kiel utila, eĉ necesa, povas esti nia lingvo por internaciaj sciencaj kaj fakaj kongresoj, kies celo estas disvastiĝado de iu ajn ideo.

Prelegoj de la somera universitato estis tre vigle vizitataj, oni nur devas menciigi, ke en estontaj kongresoj la unua prelego devas esti farata kiel eble plej modele je la elparolado de la vokaloj kaj konsonantoj: ne ĉiuj prelegoj tiujaraj kontentigis aŭdantaron en tiu ĉi direkto. Oni vidas nun, ke la lingvo esperanta, kvankam tre facila por kompreni, bezonas, kiel ĉiuj aliaj lingvoj, iom da necesa zorgemo kaj akurateco.

En tiu ĉi direkto estis tre grava dua laborkunsido, dum la kongreso en la Teknika Altlernejo. Sro Privat parolis pri elparolado kaj atentigis antaŭ ĉio pri ĝusta elparolado de konsonantoj. Ne diru: sukceso, progrezo, zed, kiel faras multaj germanoj; ne bri kaj ber, sed pri kaj per: ne diru: karaj jesamideanoj. Slavoj, precipe poloj, prononcas ĝenerale bone, sed iom moligas konsonantojn. Angloj diras ou kaj ej anstataŭ o kaj e. Bona estas itala elparolado. Sro Osaka parolis pri la uzado de io anstataŭ ujo, kio por Japanoj malfaciligas la lingvan studadon. Tre grava rimarko por eŭropanoj, kiuj devas plifaciligi la lernadon de la lingvo por orientanoj.

Precipe estas menciindaj, krom jam priparolitaj prelegoj de la somera universitato, kunvenoj de du asocioj: scienca kaj kuracista.

Scienca asocio, kies prezidanto estas la subskribinto, havis unu tre interesan kunvenon, dum kiu oni priparolis kelkajn valorajn temojn.

Ĉeestis pli ol tridek personoj. Diskutado daŭris du horojn; el administra raporto, tralegita de la Sro Letchmere-Oertel, Brita delegito, oni povas konstati viglan laboradon. La plej evidenta pruvo de la valoro de la esperanta lingvo por internaciaj sciencaj rilatoj estas la prezentita raporto de la Aerologia Observatorio de Tateno en Japanujo, ampleksa laboro enhavanta 210 paĝojn, esperante skribita.

Oni povis tuj konstati praktikan valoron de la lingvo. Ankoraŭ pli instruindaj estis tri kunvenoj de la Tutmonda kuracista asocio prezidita de la vigla Prezidanto Sro Dro Blassberg.

El tralegita raporto oni konstatas, ke la organo de la dirita Asocio: Medicina Revuo, havas jam ne malpli ol 700 abonantoj, kiuj tute kovras kostojn de la eldonado de la gazeto.

Dum tri kunsidoj de la Asocio oni aŭskultis kelkajn interesajn prelegojn kaj tre interesan diskutadon en kiu partoprenis, inter aliaj fama Danziga kuracisto Prof. Dro Petruschky.

Vidante grandan aŭskultantaron ĝis 100 personoj, oni povus jam imagi sufiĉe multenombrian unuan kuracistan esperantan kongreson.

Bedaŭrinde menciinda estas ankaŭ ombra flanko de la kongreso. Nacia ŝovinismo estas ĉiam evitinda dum niaj Esperanto kongresoj, estas ja facile evitebla: kunfratema, pacema atmosfero de la kunveninta esperanta kongresanaro eĉ ne toleras troigitan nacian senton.

Kial do dum la prediko kun premita pugno, kriante akcenti, ke Danzig ĉiam estas kaj estos germana urbo?

Ĉu iu neas hanza-germanan karakteron de Danzig?

Ĉu troa akcentado ne estas ioma signo malfavora por la danziga forto? Estas verdire konstatite, ke dum pasintaj tempoj, kiam Danzig, pole nomita Gdanjsk, estis intime ligita kun Polujo, ĝi ne nur ne suferis, sed tute kontraŭe ekonomie floris: sed ni lasu ne por ĉiuj agrablajn pasintaĵojn. Hodiaŭ ni estas Esperantistoj, kiuj celas komunan prosperon de ĉiuj nacioj de la mondo.

Ni Esperantistoj memoru tiun grandan celon!

KRONIKA PRISKRIBO DE LA JUBILEA KONGRESO EN DANZIG (GDAŃSK).

Antaŭ ĉio oni devas mencii, ke tute ĝustaj estas rimarkoj, kiujn faras kelkaj esperantaj gazetoj, precipe Heroldo de Esperanto, ke tiu ĉi danziga organiza komitato ne komencis ĝustatempe la aranĝojn por kongreso. Rezultis tre malgranda nombro de aliĝintaj personoj, kies nombro en komenco de julio atingis nur 70 aliĝintojn. Entute estis ĉirkaŭ 1000 aliĝintoj. Jam 27 de julio alvenis la unua franca karavano al Gdynia, gvidata de S-o *Delanoue*. Karavano alvenis sur la ŝipo Pologne el Havre. Entute karavano konsistis el ses nacioj. Aliaj karavanoj alvenis ĵaudon la 28 de

julio. Antaŭ la stacidomo en Danzig staras bele konstruita »triumfa pordego«, kun surskribo salutanta la Jubilean esperantan Kongreson. Kun laŭdo ni devas atentigi, ke ĉe la stacidomo oni atendis gekongresanojn kaj oni tuj informis ilin pri loĝejoj, kiuj ĝenerale estis bone prizorgitaj. La kongresejo sin trovas en la Pafista Domo (Schützenhaus), tute proksime de la stacidomo, kun belega ĝardeno, belaj salonoj kaj bona restoracio. Por ni Poloj oni nur devas konfesi, ke Danzig estas urbo multekosta; ĉio kostas preskaŭ duoble ol en Polujo; memkompreneble oni povas ĉiam aranĝigi pli ol malpli multekoste.

Koncerne la kongresejon oni devas mencii, ke ĝi servis por kongresanoj tre malmulte, nur por limigitaj kunvenoj kaj kunsidoj. Oni devis veturi longajn distancojn. La tramveturado estis senpaga, sed oni perdis tro da tempo por efektiviĝi tutan ampleksan programon de kongresaj laboroj. Vendrede la 29 en la teknika Altlernejo estis malfermita *Somera Universitato*, vere plej grava kaj fruktodona aranĝo. Nunjara devizo estas: *Unuecigo kaj normigo*, temo iomete tro speciala por gekongresanoj sed grava el la ĝenerala vidpunkto. S-o *Aelterman*, la Prezidanto de la Kongreso salutas la kunvenon. Post li P-ro *Kloepel* en la nomo de la Teknika Altlernejo salutas kaj deziras sukcesan laboron al la Somera. Antaŭ la prelego S-o *Behrendt* el Berlin pri telefonkabloj de granda distanco kaj ilia valoro ekonomia, parolis mallonge fama Pr-o *Schmidt* el Potsdam.

Sekvantan tagon parolis inter aliaj Pr-o *Bujwid* el Kraków pri la unuecigo en la metodoj de la Higieno kaj profilakto. Vendrede okazis ankaŭ unua kunsido de la blinduloj (VI Internacia Blindula Kongreso). Estas konstatite, ke por blinduloj la esperantaj kongresoj donas veran ĝojon kaj grandan internan lumigon. Oni devas unu fojon asisti je simila kunveno por konstati, kiel grandan valoron prezentas al ili Zamenhofa lingvo, kiamaniere ĝi plilarĝigas iliajn interrilatojn kun vidanta homo. Alproksimiĝas la plej solena momento de la kongreso — la malferma kunsido. En la granda salono de la *Pafista Domo* kunvenas oficialaj personoj eminentuloj, naciaj delegitoj; unuan fojon oni povas konstati, ke ĉeestas preskaŭ tuta familio de nia Majstro. Diversnaciaj, kiuj interkonatiĝis dum la interkonatiĝa vespero, komencas kutiman gajan babiladon. Eksonas marŝo: en tiu ĉi momento alvenas S-ino *Anna Tuschinski*, 85 jara esperantistino, kiu antaŭ dudek jaroj fondis danzigan Esperanto-societon. Ĉiam vigla, freŝa, laborema, vera Danziga Esperanto Patrino.

La kunsidon malfermas en la nomo de la I. C. K. S-ino *Isbrücker*. Oni elektas la estraron: Prezidanto S-o *Aelterman*, viceprezidantoj: S-roj *Adam Zamenhof*, *Kliemke*. P-ro *Bujwid*, *Ehrenberg*, *Gueritte*, *Schoofs*, *Oishi*, S-ino *Tuschinski*; sekretarioj: S-roj *Kreutz*, *Che*, *Majorkiewicz*, *Fino Marquardt* kaj S-ro *Sachse*.

S-o *Aelterman* salutas ĉiujn ĉeestantojn, precipe Senatanon D-ron *Strunk*, la Rerezentantojn de la Registaro kaj Parlamento, la oficialajn Rerezentantojn de la fremdaj Ŝtatoj, la Honoran Komitaton, la anojn de la familio de *Zamenhof*, la S-inon *Tuschinski*. Prezidanto speciale dankas la Rerezentanton de la Pola Registaro, pro faciligoj de la pasportoj kaj fervoja rabato. Li dankas la Danzigan gazetaron kaj fine esprimas la deziron, ke ĉiuj, kiuj alportis siajn naciajn kostumojn, portu ilin eĉ en la urbo, por ke oni vidu ĉie, ke la Kongreso estas vere internacia. La orkestro

ludas la himnon, la ĉeestantaro ekstarinte kantas. Post la himno S-ino *Herrnstadt-Oetingen* deklamas la Preĝon sub la Verda Standardo.

S-ro *Edmond Privat*, nia brila Oratoro, salutas kore ĉiujn alvenintojn el la preskaŭ ĉiuj landoj de la terglobo por festi Jubileon de la Esperanto. Li salutas la anojn de la Libera Urbo Danzig, la Senaton kaj la *Zamenhofan* familion. Esperanto pruvis sian vivon, ĉar ĝin parolas jam miloj da homoj. Esperanto havas ne nur lingvan, sed ankaŭ gravan idean valoron. *Zamenhof* sciis, ke tie ĉi temas pri batalo por la justeco — sur la lingva kampo. Ĉiuj, ne nur privilegiuloj, sed ankaŭ neinstruituloj devas havi rimedon por interrilatoj kun alilandanoj. Ni esperantistoj proklamas, ke ĉiu popolo havas rajton por sia lingvo kaj sia kulturo; neniuj potencoj en la mondo havas la rajton trudi al ĝi la sian. S-ro *Privat* rakontas, ke antaŭ kelka tempo li ĉeestis la belgan-kongreson en Mons kaj aŭdis de la sonorila turo diversajn popolajn kantojn: subite li ekaŭdis, ke la sonoriloj ludas la esperantan himnon. Al ĉiu aŭdinto venis tiam la penso, ke de ĉiuj turoj sonos iam tiu kanto de l' paco. La esperantistoj atingos tion, se ili konscie kaj vigle laboros ne nur por la lingvo, sed ankaŭ por pacema interkompreno. Esperantistoj devas esti vera elito de popoloj: ilia sankta devo estas plej granda komprenemo, ne laŭ nacia vidpunkto. Ni konstruu por la mondo novan domon pli indan. Malfermu larĝe la pordon, por ke la homaro vidu la lumon. D-ro *Privat* sciigas pri la morto de S-ro *Horner*, ĝen. sekr. de la Ruĝa *Kruco* en Ĝenevo.

La ĉeestantaro honoras la memoron de nia brava helpanto kaj samideano, leviĝante de siaj seĝoj.

Senatano D-ro *Strunk* salutas la kongreson en la nomo de la Prezidanto de la Senato, de la ŝtata registaro, kaj de la urba komunumo de Danzig. La Senato kaj precipe la fako de l' Arto, Scienco kaj Popolklerigo serioze observas la disvastigon de la esperanto. En tiu ĉi movado troviĝas profundaj moralaj fortoj. Li antaŭe timis, ke la esperanta movado povas malutili la germanan lingvon, sed hodiaŭ li vidas, ke tiu timo estas senbaza. La celo de Esperantistoj estas la alproksimiĝo de nacioj: li opinias, ke tiu ĉi celo devas esti aprokata de ĉiu pensanta homo. Sekretario, grafo *Randwijk*, komisiita de la Alta Komisararo de la Ligo de Nacioj, salutas ĉeestantaron. La Alta Komisararo sekvas la laborojn de la esperantistoj kun granda intereso kaj deziras bonan sukceson. Legacia Konsilanto *Zalewski* salutas en la nomo de la Pola Registaro kaj de Pola diplomata reprezentacio en Danzig: bondeziras sukceson. Li esprimas la ĝojon, ke la esperantistoj elektis la urbon Danzig por sia tiu ĉi jara Jubilea Kongreso. La laboro de la kongreso, kiu celas la interkompreniĝon de la nacioj estas tre valora. La Pola Registaro, kiu invitis kongresanojn veni *Warszawan*, faros ĉion, por ke ili estu kontentaj. En la ĉefurbo ili vidos, ke la registaro estas favora al movado. S-ro *Essigmann* tradukis pollingvan paroladon de S-ro *Zalewski* esperanten. Oni tralegis ankaŭ la telegramon de la pola ministerio de eksterlandaj aferoj. Sekvas la paroladoj de la reprezentantoj de la registaroj. Konsulo *Gelhorn*, kiel reprezentanto de la Aŭstria registaro sciigas, ke la aŭstria polico, uzanta esperanton, portas rubandon, signanta ilin, kiel esperantistojn. Baldaŭ la fervojoj havos en Aŭstrio esperantajn surskribojn en vagonaroj. P-ro *Dietterle*, reprezentanto de la germana registaro, speciale komisiita, jam 5-an fojon oficiale salutas Universalan

Kongreson de Esperanto. Germana registaro rigardas esperantan movadon kiel gravan kulturan aferon. S-ro Komandanto *Julio Mangada* de *Rosenörn* salutas en la nomo de la Hispana Registaro kaj de Ruĝa Kruco Hispana, de Hispana Instituto de Esperanto kaj en la nomo de Hisp. Esp. Asocio S-ro *Isbrüker* salutas nome de Nederlanda Ministerio por Scienco kaj Arto. Kiel kutime, li eldiras kaj hodiaŭ profundan penson: longeco de tempo estas nur relativa: se oni komparas la tempon, dum kiu staras la egiptaj piramidoj kun kvardek jaroj de la Zamenhofa ideo, oni devas ankaŭ kompari la efikon de ambaŭ. S-ro *Schiärve* salutas nome de la ministerio de Publika Instruado de Norvegujo.

Sekvas saluto de la Intern. Laboroficejo en Ĝenevo: parolas S-ro *Tarelli* en ĝia nomo. Urbestro Lindhagen el Stokholm esprimas sian bedaŭron, ke li ankoraŭ ne povas paroli esperante. Li daŭrigas dum li tralegas esperante skribitan proponon, ke la kongreso klopodu ĉe la Registaroj enkonduki lingvon internacian.

S-ro *Leono Zamenhof*, frato de la Majstro, prenas la parolon. Ĉeestantaro lin fortege aplaudas. Li parolas — li diras — kiel simpla esperantisto. Li daŭrigas la esprimon de S-ro *Isbrüker* pri piramidoj kaj aldonas, ke piramidoj dum kvardek jarcentoj silentis, esperantistoj kontraŭe dum kvardek jaroj faris grandan bruon per sia agado. Do estas certe, ke Esperanto pli longe vivos. En la nomo de diversaj Asocioj parolis: S-ro poŝta Konsilanto *Behrendt*: salutas nome de la Germana Asocio de Teknikaj Ekonomiaj Unuiĝoj. S-ro *Ernest Drezen* salutas kiel delegito de USSRa Ligo por interrilatoj kun eksterlando. Li atentigas pri la nova poŝtmarko eldonita de la Sovietruslanda poŝto. S-ro *Klein* reprezentas Paneŭropan union kaj salutas en la nomo de la Paneŭropa centro en Wien. Fino *Root* de la Internacia Bahaa Movado salutas nome de la Bahaa gvidanto S-ro *Shogi Effendi* en Haifa.

Poste sekvas salutoj de la reprezentantoj de diversaj nacioj:

Aŭstralio: S-ro *Pyke* el Melbourne. Austrio: S-ro *Steiner*. Britujo: S-ro *Robertson*. Bulgarujo: S-ro *Tričkov*. Ĉeĥoslovakio: *Krysta* (por Germanoj) kaj S-ro *Neuzil* por Ĉeĥoj. Danujo: S-ro *Melchior*. Danzig: S-ro *Tuschinski*. Estonio: S-ro *Drezen*. Finnlando: S-ro *Setälä*. Francujo: *Gueritte*. Germanujo: S-ro *Kliemke*. Grekujo: S-ro *Aelterman*. Hebreoj: S-ro *Lejzerowicz*. Hungarujo: S-ro *Tolnai*. Italujo: S-ro *Orengo*. Japanujo: S-ro *Hasegawa*. Latvio: S-ro *Pirkst*. Litovio: S-ro *Klimas*. Nederlando S-ro *Isbrüker*. Polujo: Prof. *Bujwid**). Rumanujo: S-ro *Che*. Sudslavujo: S-ro *Friedländer*. Svisujo: S-ro *Dro Spielman*.

La sabata programo estis tro ŝargita por ke oni povu ĉiam kaj ĉie ĉeesti. Somera universitato, fakaj kunsidoj, laborkunsido, ekskursoj, Radiostacio kun salutparoladoj. Vespere por speciale invititaj Akcepto en Artushof: Oni ne scias, kion elekti. Ĉion ampleksi tute neeble. Dum la laborkunsido S-ro *Dro Dietterle* sciigas pri anketo de *Prof. Bovet* koncerne la vortnombron en diversaj lernolibroj. Nia movado suferas pro neordemo kaj maldisciplino: ni ankoraŭ ne posedas sufiĉe certan statistikon pri movado. Ĝis nun li ricevis sciigojn de 1247 el ekzistantaj 3117 grupoj. Laŭ tio estas: 36025 organizitaj esperantistoj kaj 8600 izoluloj. Entute ĝisnunaj respondoj sumas

*) Dum la salutparolado farita en la nomo de ĉiuj pollandaj Societoj, *Prof. Bujwid* mencias, ke la Societo Konkordo en Warŝava kaj ĵus fondita Societo de Varŝavaj tramvojoj alsendis specialajn salutleterojn.

105000 esperantistojn. S-ro *Dro Privat* mencias, ke en 1929 ICK intencas aranĝi teknikan konferencon pri la protekto kaj higieno de l'infano. Sino *Buxton* parolas pri la Internacia unuiĝo de la Savinfana Ligo.

Heroldo de Espo, el kiu ni parte ĉerpas tiujn informojn, opinias prave, dirante, ke oni devas ne tro rapidi pri alpreno de diversaj resolucioj, ĉar ofte povas okazi malkompreno. Vespere je la 8 la radiostacioj en Danzig kaj Królewiec (Königsberg) disaŭdigis paroladojn en naciaj lingvo kaj esperanto. En pola lingvo parolis S-ro *Dr. Mędrkiewicz* el Lublin.

Sabaton vespere okazis akcepto ĉe la Senato de la urbo Danzig en Artushof. Ĉeestis multaj esperantaj kaj ne esperantaj eminentuloj: Alta Komisararo de la Ligo de Nacioj, Prezidanto de la Senato, Konsuloj, Membroj de la familio *Zamenhof*. Salutis la gastojn Ŝtata Prezidanto *Dro Sahn*. Respondis S-ro *Privat*, dankante por la invito.

Dimanĉon, oni vizitis diservojn; katolikan kun belega prediko de S-ro *Che* al kiu, asistis multaj Esperantistoj. La enhavo de la prediko estis plena je profundaj pensoj. Protestantan predikon faris S-ro *Lösche*. Tagmeze estis promenada koncerto de la Danziga Orkestra Unuiĝo kaj rondflugoj. Ekster la programo okazis la surŝipa ekskurso aranĝita de S-ro *Orzechowski* sur la belega pola ŝipo Gdańsk al nova pola haveno Gdynia por ĝin viziti kaj vidigi al eksterlandanoj rapidan progreson de disvolviĝo de la haveno.

Posttagmeze okazis *plantado de la Jubilea kverko en Zoppot*. Ceremonio estis belega kaj vere impona. De la stacidomo ĝis la arbaro, kie oni plantis kverkon estas sufiĉe longa piedirado, kiu sub la brila aŭgusta suno, kvankam tre agrabla, estis iomete laciga. Sur la placo meze en arbaro estis plantita kverko kaj en angulo staras memorŝtono kun surskribo en esperanta kaj germana lingvoj: Esperanto-Grund-Jubilea kverko plantita de partoprenantoj de la XIX Universala Kongreso de Esperanto en Danzig kaj Zoppot por la memoro de la 40 jara ekzisto de la internacia lingvo Esperanto, 31 Julio 1927.

Urba konsilanto S-ro *Gericke* kaj Kuraca Direktoro S-ro *Żychliński* prenis memorŝtonon kaj kverkon en la protekton de la urbo. Estis alportitaj partetoj de tero de la diversaj landoj de la terglobo: ne mankis ankaŭ de Aŭstralio. Kiel unua metis Fino *Zamenhof* teron desur la tombo de sia Patro. Jubilea Festvespero kun kostumbalo, kiel kutime, bonege sukcesis. Sed, kiel prave rimarkas Heroldo, oni ne aŭdis multe da gajaj vere esperantaj paroladoj: oni parolis, eĉ kantis tro multe pri ne ĝoja pasinteco, ofte rüĝigita per frata sango, forgesante, ke por Esperanto kaj esperantistoj malfermiĝas vasta, fruktodona estonteco. Sed ĉio estas bona, kio bone finiĝas. Ne ĉiuj povis resti ĝis la fino de la tre amuza vespero Tro forta estis la ne venkebla Morfeo.

Lundon je la 14:30 okazis publika laborkunsido de Konstanta Rezentantaro kaj Komitato de UEA kun ICK en la granda salono de la Parlamento. Sekvas la invitoj de diversaj urboj kaj registaroj por venontaj kongresoj. S-ro *Glück* invitas en la nomo de Berlino por 1930, S-ro *Mangada* invitas nome de Madrid kaj aldonas, ke li jam de longe invitas al Madrid, sen rezulto. Prof. *Bujwid* memorigas, ke jam en Edinburgo pasintan jaron, li, kvankam persone, sed en interkonsento kun pola samideanaro invitis por la jaro 1928 Universalan Kongreson al Pollando, nune li prezentas la oficialajn invitojn de la Registaro kaj Urbestro de Poznań. S-ro *Balkanyi*

memorigas, ke li, jam dum la Konferenco en Praha, en aprilo, oficiale invitis Kongreson por 1929 Budapeston. Post mallonga diskutado oni decidis, ke en 1929, post jam delonge decidita Kongreso en Antverpeno en 1928, sekvos Budapesto en 1929. Oni ankaŭ diskutas pri la statistiko kaj pri Radio.

Post tiu ĉi kunsido sekvis agrabla invito: akcepto ĉe la Alta Komisararo de la Ligo de Nacioj Sro v. *Hamel*. La akcepto okazis en la parko de la loĝejo de Sro Komisararo. Estis invititaj ĉirkaŭ 150 personoj. La Alta Komisararo kun afabla Edzino ambaŭ salutis alvenantajn gastojn. Dum sia salutparolado, farita germane, li konstatis, ke la esperanta lingvo havas grandan valoron por interkompreniĝo de popoloj; kiel holandano li komprenas signifon de la lingvo, kiu estas potenca ilo de interkompreno kaj sekve de interkonsento. Sro *Grenkamp* deklamis poemon *Don Kihoto*, tre bona ilustraĵo por la kompreno, kiu regas inter la ne esperanta mondo koncerne la esperantan movadon. La deklamanto estis tute merite aplaŭdita. Sro *Dro Privat* dankis por la salutparolado de la Alta Komisararo. Mardon 2 aŭgusto okazis dua laborkunsido. Sro *Warden*, nia malnova, ĉiam vigle laboranta samideano tralegis raporton de la Akademio Esperanta. Sro *Privat* parolis pri prononcado. Li rimarkas, ke ĉiu nacio havas specialajn manierojn elparoli vokalojn au konsonantojn. Prof. *Bujwid* proponas enkonduki dum la prelegoj de la Somera Universitato unu modelan prelegon de elparolado.

Post la laborkunsido Sro *Schoofs* montris filmon, sur kiu oni povis vidi diversajn interesajn konstruaĵojn kaj arĥitekturaĵojn en Bruselo kaj Antverpeno, urbo de la venonta Internacia kongreso en 1928. Dum la paŭzo la firmao Tri-Ergon en Berlino disdonis al ĉiuj eksterlandaj gekongresanoj gramofonajn diskojn kun parolado de Sro *Privat* en la malferma kunsido kaj saluton al Danzig faritan de Sino *Herrnstadt-Oettingen*. Ni esprimas dankon por tiu malavara donaco en la nomo de la kongresanoj.

Dum la lastaj du tagoj oni ofte havis okazon viziti Zoppot, konatan banlokon kun multaj bonaj kaj belaj komfortaj aranĝoj. Sed por tio ĉi oni devis havi multe da tempo kaj tute ne malhelpis havi poŝon plenplenan de guldenoj. Oni prenis volonte dolarojn kaj alian monon. Sed ni malriĉaj polaj ŝtatanoj ofte devis nur esti kontentaj vidante gajan amuzadon de aliaj. Oni nur ne devas esti pesimisto, kiam oni havas honoron esti esperantisto. Cetere Zoppot estas ĉiam tiel plenigita de homoj, ke, se oni preferas trankvilan ripozon, oni serĉas aliajn lokojn por ripozo: kaj oni trovas ilin en Gdynia, aŭ en Hel, kiuj ambaŭ estas tute proksimaj kaj multe pli malkostaj. Du belaj ŝipoj ĉiutage iras en tiu direkto. Troŝargitaj de nia ĉiutaga laboro ni ne havis multe da okazo fari ekskursojn: sed dufoje ni povis fari ĉi tiun agrablan promenon. Marbanoj sur la bordo de la duoninsulo Hel estas multe pli agrablaj, ol marbanoj en Zoppot: oni havas tute puran marakvon, kontraŭe ol en la proksimo de la granda urbo, kiel Zoppot.

En la lasta tago okazis ankaŭ akcepto ĉe la generala Komisararo de Polujo en Gdańsk. La vizito ĉe Sro Ministro *Strassburger* estis unu el plej memorindaj okazintaĵoj dum la kongreso. Estis invititaj multaj danziganoj kaj eksterlandanoj: ĉiuj ĝuis tre bonan akcepton. Ministro *Strassburger* salutis gekongresanojn esprimante ĝojon, ke li vidas ilin tiel diversnaciajn, precipe en Danzig. Gaja, senzorgema babilado antaŭ reĝe servitaj tabloj daŭris ĝis meznokto. Pri aranĝoj koncernantaj la pilgrimon al la Tombo

de la Majstro en Warszawa multege klopodis precipe ambaŭ gesinjoroj *Essigman*. Ni esprimas al ili koran dankon.

ALVENO AL WARSZAWA.

La plej multaj kongresanoj alvenis Warszawon vespere. Ili elvagoniĝis ne, kiel kutime antaŭ ordinara pordo destinita por ĉiuj vojaĝantoj, sed oni malfermis antaŭ ili paradan pordon destinitan por eksterordinaraj gastoj eksterlandaj kaj por akcepto de la Prezidanto de la Respubliko. Gekongresanojn salutis esperante Sro Direktoro *L. Klimecki* nome de la Ministerio de eksterlandaj Aferoj, sro Vicprezidanto de la urbo Warszawa Ing. *Rogowicz* kaj nia orbuŝa oratoro, famekonata samideano poeto *Leo Belmont*. Por la alvenintoj estis jam prizorgitaj loĝejoj; malfrua horo igis ĉiujn ripozi kaj dormi. Vojaĝo daŭris ja ĉirkaŭ 9 horojn.

Alproksimiĝas vere emocia momento: oni salutos la jam de dek jaroj ripozantajn restaĵojn de la Homo, kiu pensadis pri prospero de tuta homaro, kiu prizorgis por ĝi plej valoran, plej fortan interligilon. Hodiaŭ lin oni honoros, kiel oni honoris ne multajn. Sub la ŝtona Monumento konstruita ne el ŝtono, sed el kora amo de la elito de ĉiuj popoloj de la mondo oni divenas ne mortajn restaĵojn, sed simbolon de la eterna vivo en paco kaj amo por amikoj kaj malamikoj. Tuj parolos honorige ĉiuj landoj kaj nacioj de la mondo. Komencas Sro *Pyke* el Aŭstralio, kiu estis plej vigla propagandisto kaj monkollektinto por la monumento.

PAROLADO DE S-RO PYKE.

„Mi estas tre fiera, ke oni petis min paroli hodiaŭ ĉe la tombo de nia kara Majstro. Estas honoro por Aŭstralio, ke ĝia reprezentanto estu la unua por paroli. Sed eble ĝi estas tre konvena, ke la voĉo de Aŭstralio estu la unua, ĉar ĝi montras al la homaro, ke la lingvo de *Zamenhof* jam atingis la plej malproksimajn lokojn de la mondo.

En mia lando la scio pri Esperanto disvastiĝas kaj jam estas multaj, kiuj lernis la lingvon. Kial ili faris tion? Vi devas memori, ke Aŭstralio estas tute Brita lando kaj nur la angla lingvo estas aŭdita tie. La vizitantoj de la lando estas nur el Granda Britujo aŭ Usono, ĉiuj vizitantoj parolas sole la anglan. Oni ne sentas la bezonon de internacia lingvo. Kial la Aŭstralianoj lernas Esperanton? Ili ne havas mem profiton el ĝi?

Estas, ĉar la loĝantaro de Aŭstralio estas progresema popolo! Ili scias, estas la tempo por la fratiĝo de la mondo!

Ili aŭdis la alvokon de Esperantismo de *Zamenhof*! La interna ideo de Esperanto! Tial mi diras, ke estas ankoraŭ unu ligilo inter Aŭstralio kaj la memoro de la viro, kiun ni renkontigas hodiaŭ por honori. Mi ĝojas, ke la sumo, kiu estis kolektita en Aŭstralio, kontentigis la Komitaton, kiu prizorgis la starigon de la tombo de l'Majstro. Mi volas diri al ili, ke el la tuto de la lando kaj el Nova Zelando mi ricevis tre kortuŝajn vortojn, kiam oni sendis monon al mi, la oficiala kolektanto. Pro tio ke la nobla, sindonema vivo de l'aŭtoro de Esperanto montras al la mondo la plej bonan vojon por homoj, la sento de la loĝantoj, kiuj estas sub la suda kruco, estis tuŝata. Iu pioniro en la norda parto de Kvinslando, la tropika loko de Aŭstralio, sendis unu funton al redaktoro de socialista gazeto en

Melbourne, petante ke se li konas la kolektanton por la *Zamenhofa* monumento, donu ĝin al li, ĉar li alte estimas la elpensinton de la internacia lingvo. La reprezentanto por Melbourne en la Federala Aŭstralia Parlamento sendis dek ŝilingojn. Kun ĝi li sendis leteron, en kiu li esprimis la samajn sentojn, kiujn *Zamenhof* sentis, kiam li donis nian karan lingvon al la mondo. Ĉiam la sama respekto por la memoro al nia heroo — ĉu la persono estas humila laboristo aŭ el la plej alta klaso. Mi staras ĉi tie hodiaŭ kun ĝojo, ĉar mi povas atesti pri la honoro, kiun oni sentas en Aŭstralio por nia kara Majstro, la kara Majstro, pri kiu mi povas traduki la vorton de fama angla verkistino (George Eliot):

„Li aniĝas al la ĥoro nevidebla
Kies muziko estas la ĝojo de l'mond'“

Sekve prenis la parolon s-ro *Warden*, nia estimata vicprezidanto de la Akademio, en nomo de la internacia monumenta komitato, redonante la monumenton al la familio *Zamenhof*. Reprezentanto de la ministro pri eksterlando, s-ro *Leon Klimecki* substrekas signifon de la ideo kaj de la lingvo en vivo de l'popolòj, salutas varme la kongresanojn kaj deziras sukcesojn en realigado de iliaj idealoj. S-ro *Inĝ. Rogowicz*, parolante en la nomo de l'urba konsilataro, ĝojas, ke restaĵoj de l'granda homo ripozas en la ĉefurbo de Pollando, kaj esprimas sian homagion.

Post la parolado de *Dr. Edmond Privat*, sekvas alparoloj de reprezentantoj de registaroj kaj kunvenintaj nacioj: *Mangada* (hispana registaro), *Feldstein* (hebrea komunumo), *Steiner* (Aŭstrujo), *Tričkov* (Bulgarujo), s-ino *Dresen* (Estonujo), *Setälä* (Finnlando), *Krysta* (Ĉeĥoslovakujo), *Pino* (Hispanujo), *Onnen* (Holando), *Balkanyi* (Hungarujo), *Delanoue* (Francujo), s-ino *Blicher* (Danujo), *Boutwood* (Anglujo), *Dr. Canuto* (Italujo), *Dr. Inĝ. Ossaka* (Japanujo), s-ino *Hernstädt-Oettingen* (Germanujo), *Dreher* (Hebreoj), *Dr. Spielmann* (Svisujo), *Nylen* (Svedujo), *Haman* (Usono), *Drezen* (Sovetlando), *Dragutin-Friedländer* (Jugoslavio), *Couffinhal* (Afriko), *prof. Dr. Bujwid* kaj *Leo Belmont* (Pollando).

Post ĉiu parolado la koncerna nacia grupo preterpaŝis apud la monumento. La ceremonio evidente kortuŝis ĉiujn kunvenintojn, kiuj iafoje kun larmoj en siaj okuloj paroladis por honori memoron de la Majstro. La solenon finas himno „Espero“, kantata de opera ĥoro. Per specialaj tramvagonoj la kongresanaro venas al la monumento de *Mickiewicz*.

ĈE LA MONUMENTO DE MICKIEWICZ.

La alvenintojn fotografas kelkaj fotografistoj. Sekve komenciĝas la ceremonio. *Dr. Edmond Privat*, prezidanto de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, prezentas veran bildon de la antaŭmilita vivo en Pollando kaj rolon, kiun ludis la poeto por sia patrujo kaj por la tuta homaro.

PAROLADO DE DR. EDMOND PRIVAT.

P O L A J C I V I T A N O J

Permesu al fremdulo, filo de malgranda kaj neproksima Svislando, alporti kelkajn florojn por honori la memoron de via granda poeto kaj

profeto Adam Mickiewicz. Niaj avoj aŭskultis al li antaŭ 88 jaroj, kiam li instruis en la Universitato en Lausanne. Poste kelkaj el ili aŭdis lin en Parizo ĉe Collège de France.

Kio frapis ilin per neforgesebla impresio, tio estis la ĉiama alteco de lia genio. Unuflanke li simbolis sian tiam malfeliĉan Pollandon disŝiritan kaj sangumitan per subpremo kaj tamen aliflanke li simbolis la tutan homaron serĉantan sian harmonion en amo kaj pardono.

Post la terura buĉado kaj persekutado de 1831 lia grandanima kaj frata sinteno al la najbara nacio mirigis ĉiujn. Post ĉiuj suferoj, post ĉiuj maljustaĵoj, li kuraĝis proklami la devon oferi eĉ la malamon kaj alvokis al frateco.

„Mi ankoraŭ ŝvitas repensante pri tio, skribis poste Michelet, la fama historiisto, kiu fidele sekvis la kurson de Mickiewicz pri slavaj literaturoj... La polaj aŭdantoj prezentis fidelan bildon, de l'doloro kaj mizero. Rifuĝintoj, forpelitoj, kondamnitoj, maljunuloj rompitaĵoj de l'aĝo, vivantaj ruinoj de l'malnovaj bataltempoj, malfeliĉaj virinoj funebre vestitaj. Iliaj edzoj, iliaj infanoj enterigitaj sur la batalejoj aŭ en minejoj de Siberio! Tia vido boris la koron... Kia forteco, kia oferego kaj disŝiro necesis por tiel paroli al ili, por eltiri ilian forgeson kaj pardonon kaj por forpreni de ili ĉion, kio restis kaj ilian lastan trezoron: la malamon“.

Jes, via granda poeto havis tiun fortecon. En la lando mem liaj poemoj, legitaj sekrete, revarmigis sub ĉiuj doloroj la brulantan flamon de l'espero. Eksterlande, al tiu vasta disbandigita armeo de rifuĝintoj, lia epopeo „Sinjoro Tadeo“ memorigis pri la dolĉa hejmo, pri la neforgesebla kamparo, pri la tagoj de l'juneco ĝoja. Al la mondo lia la Libro de l'pilgrimantoj profetis novajn tempojn.

En sia krucumita nacio la poeto vidis kvazaŭ Kriston de popoloj, mortintan pro la perfertoj kaj krimoj de la ŝtatoj. Sed same ĝi estis iam venkonta la tombon kaj sigelonta la ligon de l'nacioj. Mickiewicz esperis, ke post la revivigo de Pollando ĉiuj militoj ĉesiĝos en Eŭropo. Ni kore bondezirus, ke tiu dua profetaĵo sin montru tiel vera, kiel la unua.

Per Esperanto, per la majstraj tradukoj de *Grabowski*, mi konatiĝis kun la verkoj de Mickiewicz kaj miloj da aliaj homoj tute same. Per tiu helpa lingvo, ankaŭ frukto de la riĉa pola tero, povu disvastiĝi tra la tuta mondo la granda inspiro de l'poeto al tuthomara interkompreno kaj harmonio!

(paroladoj laŭ E. P. A. Bulteno N. 4).

FERMA KUNSIDO.

En la belega salono de la Warszawa urbodomo amasiĝis multaj invititaj gastoj kaj kongresanoj jam antaŭ la destinita horo de la kunveno. Ceestas ankaŭ multenombra publiko neesperantista, kiu unufoje en Warszawa vidas, ke esperantistaro estas vere multenacia. Prezidas *Prof. Bujwid*, kiu post la danko esprimita al la Rezentantoj de la Registaro kaj Aŭtonomiaj estroj proponas sendi telegramojn al la Sroj: Prezidanto *Mościcki* kaj al la ĉefministro *Piłsudski*. Propono estas aplaŭde aklamita. *Prof. Bujwid* cedas prezidan lokon al la Prezidanto de UEA S-o *Dro Privat* kaj proponas, kiel Vicprezidantoj: Sron kaj sinon *Essigman*, Sron *Belmont*; kiel sekretarioj: Finon *Lidja Zamenhofówna*, F-inon *H. Weinsztejnówna*, Sron *Trochimowski* kaj *Zysman*. S-ro *Privat* donas voĉon al S-ro *Słomiński*

Urbestro de Warszawa, kiu salutas Kongresanojn kunvenintajn en Warszawa. En tiu urbo ripozas cindroj de la Kreinto de la lingvo, kiu povas iĝi tre valora ligilo inter ĉiuj popoloj de la mondo. „Vivu esperanto“. Polan paroladon tradukis Fino *Lidja Zamenhof*. Prenas la parolon *Dro Privat*. „Mi karesis dum mia vivo du ideojn: reviviĝo de Polujo kaj venko de Esperanto. Unu el ili jam efektiviĝis, ke la dua tiel efektiviĝu, kiel la unua. Sro *Urbestro!* Hodiaŭ mi pasis unu el ne famaj stratoj de via urbo. Ĝi nomiĝas: Dzika. Ne estas ĝi grava strato. Kaj mi pensis: iam, kiam mi estos blankhara maljunulo, mi pasos tiun ĉi straton, sed ĝi jam ne portos la nomon Dzika sed la strato *Zamenhova*“. Tiujn vortojn sekvis vera uragano de aplaŭdoj, kiuj daŭris kelkajn minutojn. „Tie loĝis kaj laboris“, daŭras *Dro Privat*, „verkis kaj bonfaris *Dro Zamenhof*. Al malriĉaj kudristinoj, al mizeraj laboristoj li penadis doni la eblon vidi; kaj al ni ankaŭ donis la eblon ekvidi per la okuloj de nia animo: kaj mi estas feliĉa, ke en tiu tero, kiun mi ĉiam ŝatis, kie, ĉiam ĉiuj popoloj estis liberaj — ripozas la korpo de nia adorata *Dro Zamenhof*“.

Polen tradukis paroladon Sro *Belmont*. Ĝis tiu momento funkciis la radio disaŭdigo de la paroladoj. *Dro Privat* priparolas la situacion de UEA kiu estas vera bazo de la esp. movado. Ĉiuj diskutantoj subtenas la parolanton kaj esprimas opinion, ke UEA estas nepre subteninda.

Kelkaj vortoj parolis ankaŭ Sro *Lindhagen*, urbestro de Stokholm. Poste la horo ekkantis la Himnon je akompano de Sro *Hirschfeld* direktoro de Warszawa opero. En la radiostacio je la 8a (20) oni disaŭdigis diverslingvajn paroladojn: Sro *Balkanyi* parolis hungare, poste esperante, Sro *Skog* svede kaj esperante, Sro *Wiesenfeld*, en la nomo de la prezidanto de Ĝeneva radiostacio *Dro Privat*, salutis la tutmondan aŭdantaron. Estas menciinde, ke Sro *Wiesenfeld* belege priskribis neforgeseblajn momentojn de la Warszawaj esperantaj festotagoj en N. 34 de Heroldo de Esperanto. Vespere oni pasigis agrable la tempon aŭdante polan muzikon en Dolina Szwajcarska (Svisuja Valo).

Oni devas menci, ke la Familio Zamenhova: Sro *Adam Zamenhof* kun Edzino, Sinoj *Zofja Zamenhof* kaj *Lidja Zamenhof* gastigis la kongresanojn en sia loĝejo, kiun antaŭe okupis kaj kie mortis ilia Patro. Oni povis vidi multajn memoraĵojn de la Majstro, kaj belan buston lian, faritan de *Gabowicz*. La 6an de agosto ni vizitis la naskiĝurbon — Białystok.

Ne pli ol 4—5 horoj de Warszawa. Ĉe la elvagoniĝo ni estas surprinitaj: esperantan himnon ludas bonege militista orkestro. Salutas multnombrajn alvenintojn reprezentantoj de la Vojevodio kaj Urba estraro. Sroj *Ŝapiro* kaj *Kurjański* dume disdonas la loĝejkartojn. Ĉio bonege aranĝita. Ni preskaŭ ne povas antaŭiri pro la ĉirkaŭantaj nin scivolemuloj. Per aŭtomobiloj ni atingas hotelojn. Dumvoje ni povas iom ekvidi urbon. Beligis de post la liberigo de Polujo kaj treege puriĝis. Estis ja ĉiam, kiam mi memoras, malpura urbeto, kvankam industria. Hodiaŭ ĝi similas al multaj aliaj polaj urboj. Oni ĉie rimarkas, ke la kongreso estis atendita: super la strato oni vidas streĉitan rubandon kun surskribo: „koran bonvenon“. Ni alvenas al la Zamenhova strato, kie troviĝas naskiĝdomo. Tuta strato kaj proksimaj domoj riĉe ornamitaj per festonoj, rubandoj, floroj. La fama domo estas mizera urbeto dometo ligna, preskaŭ ruinigita. Alproksimiĝas Sro Vojevodo, honora protektanto de la hodiaŭa festo, Inĝ. *Rembowski*, kiu

salutas esperantan ĉeestantaron en pola lingvo, tradukita tuj por la esperantistoj. Poste parolas P-ro *Bujwid* en la nomo de la Pollanda Esperanto Delegitaro. Parolis ankoraŭ kelkaj parolantoj. Dum la parolado S-ro *Vojevodo* malkovris granitan memortabulon kun surskribo: En tiu ĉi domo naskiĝis *L. L. Zamenhof*, la aŭtoro de esperanto. Surskribo dulingva: pole kaj esperante. Post la parolado de la Vojevodo sekvis pola nacia kaj esperanta himnoj. Post la malkovro de la memortabulo ni ĉiuj kolektiĝis por bone meritita tagmanĝo. Restoracio en hotelo Ryc tre bone servita, ĉirkaŭita de verdaĵo, faras bonegan impreson. Manĝaĵoj bonaj, bongustaj, ne multekostaj. Bedaŭrinde ni ne povis resti en Białystok ĝis morgaŭ, ĉar ni devis viziti ankoraŭ Krakovon. Tial ni ne povis asisti ĉe tre interesa vizitado de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, nek povis fari intereseĝan ekskurson al la fama Białowieża arbaro.

P-ro Odo Bujwid.

NEKONGRESA POSTKONGRESO EN KRAKÓW.

Kraków kun siaj altvaloraj memoraĵoj, arĥitekturaj konstruaĵoj, antikva reĝa kastelo Wawel, Katedralo kun tomboj de la reĝoj estas ĉiam alloga urbo: estis ne multaj, kiuj post sufiĉe longedaŭra kongreso povis ankoraŭ havi kelkajn tagojn por viziti Krakovon. Tamen despli multe valoras tiela interesiĝo. Tiuj kongresanoj, kiuj alvenis, estis kiel eble plej inde akceptitaj kaj povis viziti ĉiujn vidindaĵojn sub sperta gvidado.

Laŭ komuniko en la N-o VII de Pola Esp-o post Warszawa postkongreso P. E. D. veturigis multajn eksterlandajn gastojn al la urbo de l' Oka. Ĝenerale dum unuaj tagoj de Aŭgusto vizitis Krakovon 48 personoj el 12 landoj kaj 2 kontinentoj. Plej granda parto de kongresanoj alvenis Krakovon dimanĉe la 7-an de Aŭgusto kaj restis ĝis mardo, kelkaj eĉ ĝis vendredo. Vizitintoj iradis kune gvidataj de krakovaj geesperantistoj: s-ino *Bronisława Rosenthal*, s-oj D-o *M. Blassberg*, *Juliusz Kriss* kaj *I. Wiesenberger*. Ĝenerala organizo kaj gvidado kuŝis en la manoj de s-o *M. Ziomek*. — Gastoj rigardis ĉiujn pli interesajn monumentojn kaj vidindaĵojn de Krakovo, faris ekskurson al termonumento de Kościuszko kaj al salminejoj en Wieliczka. Ĉiuj tag-kaj vesper-manĝoj estis komunaj. Ĝenerale dum la tuta restado en Kraków ĉiuj venintoj estis ĉiam kune. Tio bonege helpis al agrabla agordo kaj interkonatiĝo. Almenaŭ tie (kaj antaŭe en Warszawa) estis fondita »unu granda rondo familia« el ĉiuj nacioj, kion la organizo de l' XIX tute malebligis. Daŭrus tro longe, se ni volus nomi kaj priskribi ĉiujn »nekongresajn aranĝojn«, paroladojn, ŝercojn ktp. Mi skizetos nur tri, hazarde elektitajn momentojn.

* * *

Belega suna posttagmezo. Sur negranda monteto ia moviĝema kaj interesa grupo ĉirkaŭas kun admiro ian ŝtonegon. Kiuj estas tiuj ĉi gastoj per stranga lingvo parolantaj, de kie kaj pro kio ili tien venis? Venis el la tuta mond' esperanta frataro por honori la plej grandan heroon de gastanta ĝin nacio—Tadeusz Kościuszko. Kaj post momento de silento—tiel inter esperantistoj malofta—dum kiu oni pensis pri tiu ĉi heroo kaj kom-

paris Lin kun propranaciaj Granduloj — komenciĝis babilado. Diversajn spritajn ŝercojn kaj anekdotojn rakontis ..— kiu? —.. memkopreneble inĝ. *Orengo* el Torino. Poste sekvis kantado de popolaj melodioj. Kantis ĥore italoj kaj ĉeĥoj, sole japano. Respondis al ili per polaj kantetoj polnacia esperantistaro helpata de okazaj ĉeestantoj. Kaj fine, kiam la suno mal-supreniranta komencis per siaj radioj orumi simpatiajn gastojn kvazaŭ »bonan nokton« al ili dirante — eksonoregis impona »Agordu la brustojn«... Iris al la mondo forta voko de esperantistoj. Kaj post momento revenis el malproksimo similaj sonoj. Ĉu revo aŭ la eĥo postludas? Ne! Sed la Poloj malsupre starantaj ekkantis la »Ospały i gnuśny«. Pola kanto laŭ kies vortoj kaj melodio nia neforgesebla s-ano Grabowski verkis »Agordu«. Kaj tiamaniere kunverŝiĝis en unu, potenca, harmonia akordo la pola kanto kun ĉi tiu esperante kantata. Kaj kunigita dulingva voĉo konkorde fluis en la mondon. Ĉu simbolo ia? Mi ne scias... Sed ĝi estis la momento de l' profunda emocio kaj kelkaj personoj havis iel mire malsekajn okulojn...

* * *

Vespero. En subĉiela restoracio sur krakovaj plantacioj inter disĵetitaj tabletoj atentigas iu mire granda kaj longa tablo. Kaj sur ĝi flirtas stelaj, verdkoloraj standardetoj kaj ĉe ĝi iaj eksterordinaraj gastoj. Apud malgranda, oblikvokula, flavvizaĝa Japano sidas grandkorpa, blonda Svedo, apud moviĝema, vigla kaj ĉieestanta ĉeĥino trankvila, kvazaŭ ŝtonigita en sia inda seriozeco — anglo. Sed malgraŭ ĉiuj diferencoj en aspekto kaj kutimoj ĉiuj bone kaj gaje amuziĝas. Subite ekstaras iu strangulo kun longaj, karbonigraj haroj, havante ne grandan, ankaŭ nigregan barbon, kies du akraj pintoj ŝajnas esti pretaj disbati kaj trapiki ĉiujn kontraŭulojn. Antaŭenĵetinte siajn longajn manojn kaj supren sian kapon levinte li aspektas kiel Jovo tondranta. Li komencas paroli! Paroli per belaj, ekstreme dolĉaj vortoj pri Kraków, ĝies vidindaĵoj kaj vizitindaĵaj esperantistoj... Poste en mielvoĉa prelego li substrekas valoron de l' Esperanto. Nin alparolante li direktis sin al neesperantista ĉeestantaro. Kaj ekinterestigita publiko ĉirkaŭas nian aron kaj aŭskultas. Ĝi aŭskultas kaj miras pro belsono de l' lingvo, pro oportuneco de l' internacia interkompreniĝilo, pro facileco de l' pensesprimo. Kaj multaj miras: »kiel interesa lingvo. Mi, ne konante ĝin, multon, eĉ preskaŭ ĉion komprenas«. Poste jam dum la tuta vespero sur ĉies buŝoj estis Esperanto kiel sensacio de l' tago. Al inĝ. *Orengo* en la nomo de la krakova esperantistaro varme kaj kortuŝe respondis D-ro *M. Blasberg* esprimante ĝojon, ke ĉiuj estas kontentaj kaj petante ilin ofte kaj amike memori pri ni kaj, kiel eble plej ofte, nin vizitadi.

* * *

Ni multe ridis dum la krakovaj tagoj kaj ŝercis. Sed eble rekordo de tio okazis dum lasta komuna tagmanĝo, kiam ĉiuj bonhumoruloj rakontadis siajn impresojn el Danziga Kongreso kaj diversajn epizodojn el sia esperantista vivo. Freneza jam preskaŭ regis humoro dum anekdotado de s-o *Arabeno* el Ĝenova. Ĉiuj ridegis ĝis larmoj. Agrablan amuzadon finis emocia kaj belega deklamo de s-o *Grenkamp* de la »Don. Kihoto«.

*

* * *

Estis faritaj multegaj fotoj, tio estas memkomprenebla. Sed precipe agrabla, ĉar »nur« en 100.000 da ekzempleroj aperinta, estis fotografaĵo de nia grupo dum vizito de la plej granda en Polujo gazeteldonejo: *Ilustr. Kurjer Codz.* Sur ĝi ni vidas inter aliaj: s-ojn *Letchmere-Ortel*, sekr. de ISAE, el Hindujo, *Renkichi Koder* p-ron el Tokio, D-on *Canuto*, Ing. *Orengo*, Pastron *Bruno* el Italujo, *Helsing* el Svedujo, *Balkanyi* el Hungarlando, ges-ojn *Setälä* el Helsinki, Pastron *Wachowski* el Germanujo, *Farnel* k. *Bratford* el Anglujo, P-ron *Pitter* el Prerov (C. S. R.), s-inojn *Baresowa* k. *Nyultova* el Praha, *Lendel* el Potsdam kaj multajn, multajn aliajn, ĉiujn same simpatiajn, same ĉarmajn, same por ni ĉiam agrable rememorindajn.

Slavo.

VIZITO DE ESPERANTISTOJ EN WILNO.

Laŭ la invito de P.E.S. en Wilno la 15-an de Aŭgusto vizitis Wilnon konata finna esperantisto s-ro *Vilho Setälä* kun edzino.

Post vizitado de urbaj vidindaĵoj Wilna samideanaro invitis gastojn al la bela Bernardina ĝardeno por tagmanĝo. Post la tagmanĝo aŭtomobilo afable rezervita de s-ro *Vojevodo* venigis gastojn al pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj de la Wilno. Vespere je la 8 en la ĉarma salono de *Śniadeckich* en vilna universitato s-ro *Setälä* prelegis pri la »Lando de mil lagoj« (Finlando) montrante kelkdek da belaj lumbildoj, kun pollingva traduko por neesperantistoj. Finante sian prelegon s-ro *Setälä* montris la monumenton en Helsinki »*Šippereantoj*«, kiu pritraktas la momenton de finlanda mallibero kaj diris, ke poloj bone povas kompreni ĝian ideon estante kune kun finnoj subjugataj. Post traduko de tiuj vortoj, tradukanko s-ro pro-ro *Sakowicz* proponis al la ĉeestantaro esprimi sian amikecon al la frata finna popolo kaj dankis al simpatia preleganto pro liaj amikaj sentoj. La ĉeestantaro varme esprimis sian amikecon per tondraj aplaŭdoj dankante al s-ro *Setälä* kaj al lia edzino, kies bela nacia vestaĵo estis tre bona propagandilo dum la vespero.

R. Sakowicz.

REMEMORO.

La 3-an de Aŭgusto dum la XIX kongreso de Esperanto en Danzig ni faris belan ekskurson al Hel sur la pola vaporŝipo „*Gdańsk*“.

Estis 9-a horo matene, kiam ni debordiĝis kaj ekveturis antaŭen.

Malrapide, malrapide malaperadis diversaj vaporŝipoj en Danziga havena golfo, kaj fine ni estis sur plena maro.

La vetero belega, la suno brilas, la maro trankvilas.

Ni ĉiuj staris sur ferdeko, rigardis la verdajn akvojn de Bałtyk kaj serĉis sur horizonto iun ajn vaporŝipon.

Kaj poste komuna fotografado — multe da rido kaj da ĝojo.

Belega estas la maro.

Mi apogis min je l' balustrado kaj rigardis la ondojn, grim pantajn unu super la alia, batalantajn kvazaŭ en antaŭmorta kunpremo, kaj falantajn malsupren post malfacila penego.

Kaj ĉirkaŭ ili blanka ŝaŭmo — nura restaĵo de venko kaj de malvenko samtempe.

Kien-ajn turni okulon, ĉie estas la samo — kiel en la vivo: batalo, batalo kaj batalo.

Oni alvokis nin por tagmanĝi.

Ni ariĝis en belega manĝoĉambro — ĉiuj en bonaj humoroj.

Poste nia Vilna samideano lerta pianisto prokuroro Sakowicz ekludis himnon kaj ni ĉiuj kantis „La Espero“.

Sur flugiloj de l' vento, sur verdaj ondoj de Bałtyk kuris nia kanto tra la mondo kaj diris al ĉiuj pri nia ideo kaj pri ĝia lulilo — pri Polujo.

Post ia tempo ni atingis Hel.

Ni forlasis la vaporŝipon kaj iris sabloplenan vojon tra vilaĝo ĝis la pinto de tiu-ĉi duoninsulo.

Tie-ĉi sur marbordo ni petolis kiel infanoj: ni vadis en maro, ni kolektis konketojn kaj kaptis diversajn marbestetojn. Kun admiro ni rigardis meduzon kaptitan de Slavo.

Ĉio havas sian finon kaj la ekskurso ankaŭ finiĝis. Ni revenis vaporŝipon por reveturi hejmen.

Kun granda plezuro mi rememoras agrablajn momentojn sur vaporŝipo „Gdańsk“ kaj sur duoninsulo Hel kaj mi dankas en la nomo de ĉiuj partoprenintoj al s-ro profesoro por la aranĝita bela ekskurso sur la Pola maro.

Septembro 1927.

Halina Weinsteinówna.

VERDA LIBERTEMPO.

Tutan jaron mi malsatis, multajn tagojn mi fastis por fine kolekti necesan sumon por partopreni la XIX-an. Venis jam la tago de forveturo! Kun valizeto en la mano mi troviĝis en la stacidomo. Ŝajnis al mi, ke mi jam ĉeestas la kongreson, ĉar la vagonaro enhavis kelkdekon da verdsteluloj, al kiuj dumvoje aliĝis aliaj.

Post tutnokta vojaĝo la vagonaro haltis en Gdańsk. Ŝarĝita kiel ĉevalo per fremdaj valizoj mi ekstaris sur neŭtrala grundo de libera urbo. Miajn unuajn paŝojn mi direktis al akceptejo, kiun mi devis serĉi (cetere multe da tempo oni plej parte foruzis por serĉado de diversaj ejoj), kaj en tiu ĉi rilato servis al mi, kiel gvidantoj fremdlandaj blindaj (!) samideanoj.

En la akceptejo mi trovis haoson, ne nur de homoj sed ankaŭ de prizorgataj aferoj. Tri horojn atendi estis por kongresanoj, kiuj veturis almenaŭ tutan nokton, bagatelaĵo. Finfine mi estas en destinita por mi ĉambro kaj mi povas min lavi kaj iom ripozi.

Vespere interkonatiĝa vespero, dum kiu oni devis aŭskulti pli malphi bonajn spritaĵojn kaj amatoran deklamon en ĝardeno de la Pafista Domo, en kiu lokiĝis la akceptejo.

La 29-an antaŭtagmeze okazis malfermo de Somera Universitato, kiun sekvis serio da fakaj prelegoj kaj kiujn ĉeestis plej parte nefakuloj. Vespere venis ĉefaĵo de ĉiu kongreso — solena malfermo de la XIX. Universala Kongreso de Esperanto. Formis ĝin paroladoj kaj salutoj flanke de aŭtoritatoj, eminentuloj kaj reprezentantoj de diversaj landaj organizaĵoj. Pacienco estas nia plej grava eco kaj ni havis ĝin por aŭskulti kelkajn horojn kaj aplaŭdi lertajn kaj mallertajn, bonajn kaj malbonajn paroladojn. La malfermo evidentigis nur tion, ke nia movado prezentas jam forton, kiun

respektas jam regnoj kaj ŝtatoj. Kun plena kapo kaj malsata stomako ni iris je noktomezo dormi.

Sekvantan tagon oni pasigis la tempon per ĉeesto aŭ neĉeesto en diversaj fakkunsidoj, kies nura cito okupus tutan paĝon. Cetere fakaj kunsidoj okazis ĉiutage, ĉar oni ja devis doni al parolemuloj okazon satparoli. Ĉar vespere estis parto de la kongresanaro invitita al akcepto ĉe la Senato, do la alian parton oni pelis en salonon de Danziger-Hof, kiu povis enteni ducent personojn kaj kie kolektiĝis almenaŭ 500 personoj kaj tie premitaj kiel haringoj ĉiuj devis amuziĝi, ĉu dancante ĉu drinkante tre „salitan“ vinon. Impreso, kiun ĉiu elportis de ĉi tiu impona „festvespero“, ŝajnis tre simila... al skandalo.

Venis dimanĉo kun plej grava punkto de la programo — plantado de jubilea kverko en Zoppot sur ĵus nomita Esperanto-grundo. Ĉu tiu ĉi soleno havas ian realan valoron por nia movado, mi kaj ankaŭ multaj tre dubas. La situo de la Esperanto-placo kaj grundo en Zoppot estas tre maloportuna, ĉar ĝi troviĝas kelkajn kilometrojn fore de la urbo, en arbaro, kien gvidas sabla kaj peniga vojeto, malofte de la publiko vizitata. La Zoppota vivo koncentriĝas apud la maro, al maro direktiĝas paŝoj de ĉiuj alvenintoj, tie amasiĝas ĉiuj, kiuj volas profiti de sia libertempo kaj mono; la arbaron kun nia Esperanto-placo kaj jubilea kverko neniu vizitos, eble nur iu freneza esperantisto! La soleno mem prezentis nenion originalan, ĝi estis nur okazo por fotografistoj kaj denove parolemuloj. La teron por fortigo de la kverko oni alportis el diversaj partoj de l'mondo, sed plejparte el Zoppot (ĉar oni lastamomente prenis ĝin dumvoje al la solenloko).

Saman tagon vespere oni reveturis al Gdańsk por partopreni jubilean festvesperon, dum kiu oni sciigis, ke pasis 40 jaroj de ekzisto de Esperanto kaj krom tio oni havis okazon aŭskulti bonan kaj malpli bonan kanton, deklamon kaj muzikon.

Lundo, la 1. de aŭgusto estis labortago, ĉar post dimanĉo oni devas komenci la semajnon per laboro. Okazis do laborkunsido de triunuo (K. R., U. E. A. kaj I. C. K.) kaj poste multegaj fakkunsidoj. Ĉiuj do havis plenan programon por la tuta tago, ke ne estis eĉ tempo por vizitado de la urbo. Por tamen post mia reveno povi rakonti, ke mi estis en Gdańsk kaj vidis ĝin, mi, kiam ĉiuj honestaj iras dormi, iris en la urbon kaj rigardis mem tion, kion mi povis kiel vidindan rigardi.

Vere interesa estis internacia kostumbalo, okazinta la saman tagon vespere, ne pro tio, ke dancemuloj havis okazon por danci, sed oni povis vidi interesajn, internaciajn kostumojn. Specialan atenton turnis kostumo de japanino, kiu ricevis la unuan premion.

Antaŭlasta tago estis destinita por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis okazon paroli; ili povis tion fari dum lastaj prelegoj de Somera Universitato kaj laborkunsido de la kongreso. Sed ili devis rapidi, ĉar la vagonaro veturigis ilin posttagmeze al Zoppot, kie oni ne sciis, kion fari, ĉar okazis nenio speciala por la kongresanoj. Oni povis aŭskulti muzikon en la ĝardeno aŭ sidi ĉe la marbordo aŭ fine eĉ sin bani, se troviĝis tiaj kuraĝuloj, kiuj ne timis akvon. Tiamaniere oni povis pasigi la tempon, ĝis venis horo rapidi al arbara opero. Plej impresiga vidindaĵo de la tuta kongreso estis prezentado de „Götterdämmerung“ (Krepusko de l'Dioj). Sed ĝi ne estis nia

aranĝo kaj ne en nia lingvo! Ĉu ne estis ebla traduko de tiu ĉi majstro-verko de Wagner esperanten aŭ eventuala preparo de esperantaj programoj por la internacia publiko, kiu vizitis la prezentadon?! Se oni jam pagis tre altan prezon por la bileto, oni tre volonte pagus ankoraŭ iom por esperanta programo, por povi sciigi pri enhavo de la prezentado!

La lasta tago estis destinita por ŝipa ekskurso tra haveno kaj golfo de Gdańsk. La ekskurso, por plejmulto tre agraba, por aliaj finiĝis per malagraba vizito de iu diskreta loko, el kiu liberigis ilin la alveno al Zoppot. Kia estis celo de kelkfoja dum unu semajno venigo de ĉeestantoj al Zoppot? Mi havis impreson, ke celo estis ne nur viziti tiun ĉi belegan banurbon, sed ankaŭ doni okazon al tiea kazino profiti ĉe esperantistoj. Sed tiu ĉi intenco ne realiĝis, ĉar oni forgesis, ke ni estas plej parte malriĉuloj, kiuj volonte ĉion vizitas kaj rigardas, sed prefere senpage. La tago finiĝis per ankoraŭ unu balo, kiu okazis nun en salonoj de Zoppota kuracejo, sed ĝi tre malsimilis al internaciaj baloj. Plejmulto preferis reveni al Gdańsk kaj prepari sin por pilgrimo al Warszawa.

La 4-an de aŭgusto antaŭtagmeze kelkcent esperantistoj veturis per rapida vagonaro en tre bona humoro al Warszawa, kiu nin tre gastame kaj per bona organizo akceptis. Alf.

P R O P A G A N D O.

La Redakcio ricevis propagandajn artikolojn el kelkaj partoj de Pollando. Laŭ nia eblo ni presigos diversajn voĉojn kaj petas ĉiujn bonvoli priskribi pli valorajn lokajn okazintaĵojn, por ke ni eksciu veran bildon de la esperanta movado en nia lando.

ESPERANTO — PORNACIA.

Jes, ne estas eraro, internacia esperanto estas nacia afero. Kiel?—Jen mi montros al vi. Mi montros al vi karaj samideanoj, kiel vi de tiu vidpunkto povos propagi al viaj kunnacianoj. Unue vi metu al via kunnaciano la demandon: „Ĉu vi ŝatus, se pli altiĝus la inteligenteco de ĉiuj anoj de nia nacio?“ Post jeso de tiu demando vi montru, kiel tiu celo estas atingebla per esperanto, jene klarigante: En la mezlernejoj oni instruas mortajn kaj vivantajn lingvojn. La unuaj estas kutime la latina kaj la greka. La lastan oni en la praktika vivo nur tiom bezonas, kiom ekz. la sanskritan. El la latina lingvo la medicinistoj, juristoj ktp. laŭ ilia propra konfeso bezonas nur malmulton, ĉar nun neniu estas devigata studi latinajn verkojn en originalo. Pro tio dujara studado de la latina sufiĉas por la praktiko. — Tamen oni instruas latinan dum 4-8 jaroj kaj grekan ankaŭ dum longa tempo. — Kial? Oni celas precipe per tiu studado la *klerigan efikon* de tiu instruado. — Simila estas la afero rilate la studadon de vivantaj fremdlingvoj. Dum multaj jaroj oni lernigas al mezlernejoj tiujn lingvojn, kvankam oni scias el praktiko, ke ili ne povos uzi tiujn lingvojn en iliaj estontaj profesioj, ĉar ili lernis kaj scipovas ilin nur tro malbone. Tio estas konata afero. Tamen kaj ĉiam tamen oni instruas devige fremdajn naĉilingvojn. Kial? Ĉar oni celas unuavice la *spiritakrigan efikon* de tiu studado. — Jes, estas sendube, la lingvostudado kulturas la menson, plialtigas la inteligentecon. — Sed oni scias, kiom da neregulaĵoj, mallogikaĵoj enhavas

la nacilingvoj. Tiuj malbonaj ecoj ne alcelas la logikan pensmanieron de la lernantoj, kio tre necesas, eĉ malhelpas ĝin. — Se la studado de tiuj ne tro logikaj nacilingvoj tamen tiel utilas, ke ni nur pro ĝia teoria celo dediĉas al ili tiom da instrutempo, kiom multe pli efike devas utili la instruado de la logika kaj regula esperanto: Per ĝi oni povas atingi multe pli facile kaj rapide ĉiujn per la lingvostudado celitajn efektojn kaj utilojn por la menso. — Kiel por la korpo necesas la gimnastikado kaj sportado, tiel ankaŭ por la menso similaĵo estas necesa kaj nur logika esperanto povas esti tia kaj vere ideala gimnastikilo kaj samtempe la plej oportuna kvazaŭ popola peradlingvo por la tuta mondo!

Pro la malfacileco de la fremdaj nacilingvoj oni per lernejo povis peri ĝis nun la utilecon de la lingvoinstruado al nur malmultaj homoj, nur al mezlernejoj. Laŭ statistiko el 250 popollernejoj nur unu atingas la lastan klason de mezlernejo kaj pli inteligentiĝas per lingvostudado. Tio estas tro malmulte. Ĉiu nacio bezonas pli da inteligentuloj. Oni ne kulturu spiritan proletariaron, igante tro multajn homojn viziti la mezlernejon, sed inteligentigu saĝe la tutan popolon. Pro tio ĉiu postulu la devigan esp.-instruadon en ĉiuj lernejoj. — Ne estos necese plimultigi pro tio la nombron de instrueroj, ĉar oni en Anglujo spertis pereksperimente, ke popollernejoj, kiuj lernis dum unu horo semajne esperanton anstataŭ angla lingvo, jam post kelkaj monatoj prosperis pli bone en la angla lingvoinstruado ol la aliaj lernantoj. — Kompreneble! Per esp., kiu havas tre simplan grammatikon (kvazaŭ dometo kunmetita el nur 16 traboj), ĉiu lernanto facile ekkonas la esencajn necesajojn de lingvo, ekkonas bone la signifon de ĉiu lingvoparto kaj ties uzado kaj akriĝas tiel ankaŭ la okulon por ekkono de la esencaj ecoj de la propra lingvo, kaj lernas koni ĝin pli bone! Memoru: la plej valora kapitalo de ĉiu nacio estas ĝia popolo. La valoro de tiu kapitalo dependas de la inteligenteco, kapableco de tiu popolo. Ĉiu homo devas peni plialtigi la inteligentecon de sia nacio. Per esp. tio estas facile ebla. Pro tio ĉiu devas postuli la devigan esp.-instruadon en ĉiuj lernejoj, por ke iĝu pli inteligentaj ĉiuj anoj de lia nacio, ne nur unu inter 250, ĉar el tiu malgranda aro ne povas ekesti sufiĉe da eminentuloj, kapabluloj, popolgvidantoj kaj geniuloj: ne tiom, kiom bezonas le nacio. Ju pli da inteligentuloj ĝi posedos, despli da kapabluloj ĝi produktos. Ĉu iu malemos kunlabori en tiu direkto, al tia bonega grava celo? Esperantistoj, organizu viajn kunnacianojn al tiu afero. Unue oftege diskonigu per gazete al la popolo, kian utilon ĝi povos gajni por si per esperanto, paroladu pri tio, ĉiamaniere ĝin propagandu kaj kolektu subskribojn por peticio sendota al instruministro. Ni bezonas centmilojn da subskriboj. La ministerio nin favoros kaj volonte akceptos nian peticion. Tiel ni atingos nian celon! Mi jam komencis tiel propagandi kaj trovis ĉie plenan konsenton de la popolo. Neniu rajte devas resti indiferenta en tiu afero; se li tion faras, li malutilas al sia propra nacio. Niaj naciaj organizaĵoj organizu tiun aferon. Ni montru al la eksterlando la vojon celitan. Oni kunlaboros kaj per kuna laboro ni atingos la celon en gloro.

Krysta.

LA VERDA STELO SUPER OKCIDENT-POLUJO.

Surlime inter la vojevodejoj Poznań kaj Pomorze kuŝas Bydgoszcz la aktiva centro de la esperantista movado de Okcident-Polujo. Inter la kvardek lokoj de pola Esperantujo, reprezentantaj la mondlingvan movadon, jam longjare estas Bydgoszcz. Inter la (1300) mil tricent punktoj sur nia terglobo ligitaj per la delegitaro de nia modela Esperantuja registaro-Universala Esperanta Asocio- la urbo troviĝas de post jardekoj. La sufokaj lastaj tri ĝis kvar jaroj minacis forte la lokan movadon. Longtempe nia lumanta stelo ĉi tie preskaŭ tute ŝajnis estingiĝi. Nur kelkaj ankoraŭ ardantaj meteoroj flame anoncis en urbe kaj en province ĝian ekziston.

Vulkana erupcio printempa de tiu ĉi jaro (14 III. 1927) de nove ekradiigis la lokan stelon amatan. Malforta ankoraŭ estas ĝia brilo. La indiferenteco de kelkiuj, kaŭzita parte per finance-ekonomiaj zorgoj, malbligas la pli fortan ekbrilon.

La societa estraro despli energie laboras, etendante samtempe sian agadkampon el urbe al la ĉirkaŭantan pli vastan regionon. Dum Supra Silezio pli kaj pli bone organiziĝas, reĝas plena rigideco en la provinco Poznań kaj plej parte ankaŭ en Pomorze. Tiukaŭze ni kontaktas nun kun izoluloj de nomitaj provincoj, enkuraĝigante ilin por sia urba propagando sciigante interkonatigi adresojn de samurbaj esperantistoj por eventuala grupo-fondo kaj membrigante unuopulojn provizore al nia societo. La ligilo intermembra en tiu ĉi laboro estas la neabonebla, senpage sendata al societaj membroj „Monata Bulteno“. Tiamaniere ni volas malpliigi la bedaŭrindan haŭson kaj malorganizon en pola Esperantujo. Tiucele ankaŭ okcidentpolujaj esperantistoj Prof. Nowakowski el Poznań, Dr. Dzedzic el Toruń, Prengel kaj Ebert el Bydgoszcz kunvokis dum XIX-a Universala Mondkongreso en Danzig specialan kunsidon de okcidentpolujanoj kaj elektis laŭpropono konforman laborkomitaton. La varma iniciato de nia entuziasma samideano, universitata profesoro Nowakowski espereble efikos, ke la preskaŭ ĝisfunde morta movado en la urbo Poznań reviviĝos, ke antaŭ ĉio la loka societo ekfunkcios normale. Tuta vico da neorganizitaj izoluloj tie troviĝas, perdiĝante ĝis nun por nia movado.

Ankaŭ Toruń devas havi sian societon! Tia samideano Dr. Dzedzic intencas firme kontakti kun la, de ni proponita, energi plena organizemulo kapitano Góralczyk ĉe VIII D. O. K. Toruń. Do ni espereble baldaŭ aŭdos, ke ankaŭ la vojevoda urbo de Pomorze troviĝas en la vico de la urboj kun funkcia societo.

Grudziądz, Inowrocław, Tczew, Chojnice, Gniew kaj aliaj, jen agadkampoj, kie esperantistaj izoluloj atendas energian impulson de spertaj organizantoj. — La societa retaro en la Lulilo Mondlingva nepre devas pli grandigi. Ni fine prezentu al la mondo, kion ni ŝuldas al ĝi: plej bone organizitan fortan kaj imponan movadon esperantistan! Al laboro revekiganta Pola Okcidento iniciate vokas ĝin. Ĉu resonos en jesa eĥo tuta Polujo?

Fr. A. Prengel, Bydgoszcz.

Ni varmege subtenas la supre skribitan alvokon. Estas vere, ke Poznań kaj okcidenta parto de Polujo tro silentas. Ankaŭ nia redakcio sentas, kiel malvigla estas la movado; ĉar el okcidento ni havas proporcie mal-

multajn abonantojn. Unu ligilo-gazeto, en kiu oni povas esprimi siajn pensojn kaj penadojn, estas do tute nepre bezona.

La alvoko de s-ano *Prengel* estu bona komenco de la agado inda de okcidenta kulturo, de kiu ni multe atendas. Ni ankaŭ varme rekomendas aliĝi al P. E. D. kaj ĉeesti la estontan kunvenon en Warszawa. *Red.*

E K O N O M I A F A K O.

FR. DĄBROWSKI.

LA KOOPERATIVA MOVADO DE KONSUMENTOJ EN POLUJO.

Jam en la jaro 1715 fondis en la hodiaŭa tekstilindustria urbo Pabjanice apud Łódź la pastro Jordan siaspecan vilaĝanaran asekurisocieton, kaj la en Polujo fama politikisto kaj verkisto Stanisław Staszic (legu Staŝic) povas esti konsiderata kiel la patro de pola kooperativismo, ĉar li en siaj bienoj en Hrubieszów fondis en la jaro 1822 ampleksan vilaĝankomunumon, tre similan al la komunumoj de Robert Owen en Anglujo.

Dum la pli ol 100-jara politika mallibero de Polujo ĉiu normala ekonomia disvolviĝo de nacio estis haltigata, pro kio ankaŭ la kooperativa movado nur tre malrapide progresis. En la jaro 1900 ni havis ekz. en tuta Polujo nur ĉirkaŭ 100 konsumkoopertivojn. Post la unua rusa revolucio en la jaro 1905 la movado iom plivigliĝis. Dum la militjaroj kreskas rapide la konsum- kaj malaperadas la kreditkoopertivoj. Normala evoluo de la movado komencas nur en la postmilita periodo en la jam sendependa ŝtato. La stato de ĉi-movado prezentiĝas en la komenco de l'jaro 1927 jene: en la diversaj Centraj Asocioj de l'lando estis organizitaj:

1100 konsumkoopertivoj kun 725000, 3300 kreditkoopertivoj kun 700000—, 1500 agrikulturaj koopertivoj kun 275000 — kaj 200 alispecaj koopertivoj kun 30000 da membroj. Krom tio ekzistas en la lando ĉirkaŭ 2000 da diversaj malgrandaj, diversspecaj, sed pro sia neorganizemeco sen-signifaj koopertivoj, ne apartenantaj al iu-ajn de centraj organizoj.

En ĉiu el la antaŭmilitaj tri partoj de Polujo funkciis centraj organizoj de la konsum —, kredit —, agrikulturaj — k. a. 22 Centrajn Revisi-kaj Propagand-Asociojn, inter kiuj 13 pol-kaj 9 alilingvaj. Al la plej ĉefaj apartenas:

1) Centra Asocio de Konsumkoopertivoj de Polujo nomata populare „Społem“ („Komune“) en Warszawa kun pli ol 800 societoj de konsumantoj kun 436000 da membroj.

2) Unuiĝo de Agrikulturaj Kooperativ—Asocioj en Polujo en Warszawa, estas uniĝo de 14 Asocioj, tendencaj al postea kunfandiĝo. Al ĝi apartenas ĉirkaŭ 2000 da diversaj vilaĝanaj kredit—k. a. societoj.

3) Unio de Kooperativaj Asocioj (Unja Związków Spółdzielczych) en Poznań, ankaŭ duagrada grupiĝo de kunfandiĝontaj 10 Asocioj, al kiuj apartenas plejparte kredit-koopertivoj de Schultze-Delitzsch'a sistemo. Kelkdeko da konsumkoopertivoj de Poznania Vojevodio apartenas ankaŭ al ĝi.

4) Revisi—Asocio de Militistaj Kooperativoj en Warszawa, kun ĉirkaŭ 240 societoj, plejparte konsumkoopertivaj.

5) 9 Revisi — Asocioj de la nacia malplimulto (Ukrainoj, Judoj, Blankrusoj, Germanoj), kun 2350 da diversspecaj koopertivoj (330000 membroj).

(daŭrigota).

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

II. Konferenco de P. E. D., kiu estis prokrastita pro antaŭkongresaj aranĝoj, okazos la 29—30 X. 1927 en Warszawa. En la tagordo troviĝas: raportoj, novelektoj, proponoj ktp. Ĉiuj proponoj, ligitaj kun la Konferenco, devas esti skribe komunikataj al la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. Tial ni petas ĉiujn, kiuj deziras meti siajn proponojn al diskuto de la Konferenco, sendi ilin al ĝen. sekretario J. Alfus, (Kraków XXII, Al. Dembowskiego 10) plej malfrue ĝis 10. X. k. j.. Proponoj, ricevitaj post tiu ĉi dato ne troviĝos en la tagordo.

Laŭ § 19 de la regularo la Konferencon devas la delegitoj partopreni persone, sed ili povas anstataŭigi sin per alia delegito, kiu ne rajtas reprezenti pli ol du forestantajn delegitojn. Ciu anstataŭo devas esti skribe atestita. La nomojn de la delegitoj kaj la ciferon de reprezentitaj grupaj membroj bonvolu komuniki al sekretario de P. E. D. La Konferencon rajtas partopreni ankaŭ nedelegitoj kiel gastoj.

Kotizo por ĉiu partoprenanto estas Zł 2.—.

P. E. D. zorgos pri fervoja rabato kaj malkaraj loĝejoj.

Aliĝojn direktu provizore al la sekretario.

Aliĝo al P. E. D. Ni atentigas ĉiujn grupojn, kiuj ĝis nun ne aliĝis al P. E. D., ke ilia delegito ne rajtos voĉdoni dum kunsidoj de la Konferenco. Tial, por eviti tiun ĉi malagrablajn, ni petas: ne prokrastu Vian aliĝon al P. E. D.!

Kotizo. Multaj grupoj ne repagis ĝis nun sian kotizon. Ni petas tiujn grupojn sendi la kotizon al la sekretario.

Kiel ni aŭdis, kelkaj grupoj anstataŭ senpere pagi la kotizon al P. E. D., enpagas ĝin al distriktestraro. Ni atentigas ĉiujn grupojn, ke ili devas pagi la kotizon *senpere* kaj ni petas la distriktestrarojn sendi senprokraste pagitan de la grupoj kotizon al la sekretario de P. E. D.

Grupoj, pagantaj sian kotizon, devas ĉiam apudmeti liston montrantan ciferon de iliaj membroj ĉiumonate. La ciferoj estas necesaj por oficiala statistiko kaj por pago de la kotizo al K. R.

Gvidlibro. Ekzekutiva Komitato de P. E. D. eldonis lastatempe „Ilustritan gvidlibron tra Pollando“, kiu ampleksas 128 paĝojn kun 50 ilustraĵoj. La gvidlibro estas tre lukse eldonita kaj kostas nur Zł. 1.50. Ĉiu pola esperantisto devas ĝin posedi! Al grupoj, aĉetantaj pligrandan nombron, ni donas specialan rabaton.

Prezidanto: Prof. Dro O. Bujwid.

Ĝen. sekretario: J. Alfus.

EL LA ESPERANTA GAZETARO.

La Suno Hispana en N-o. 123 tute prave rimarkas, ke nia plej granda propaganda celo estas la deviga instruado de esperanto en la lernejoj.

Tion ni povas atingi nur per multaj tiurilataj informantaj artikoloj en naciaj gazetoj, per multaj paroladoj. Ĉiu esperantista organizaĵo elektu el siaj anoj unu aŭ du fidindajn, laboremajn personojn, kiuj kvazaŭ permanentaj propagandistoj, ĉie kaj ĉiam agu, por tiu nia gravega celo. Oni skribu en la naciaj gazetoj similan artikolon: Se oni scipovas manipuli per kelkaj lingvaj ŝablonoj, oni posedas komplete nenian lingvon. Oni po-

sedas kutime nur tute limigitan frazaron. Lernigante en mezlernejoj fremdlingvon devige, oni kutime nur turmentas la lernantojn sen iu ajn rimarkinda rezulto. Ofte post kelkaj jaroj de lernado la lernanto tute ne kapblas sufiĉe kompreneble esprimi sian penson fremdlingve. Depost jardekoj oni ripetadas, ke lernantoj estas tro ŝargitaj per lernmaterialo, ke ili korpe kaj spirite kadukiĝas sub la pezo de lernpostuloj kaj ke urĝe necesas radikala reformo de mezlerneja instruplano. Sed ĝis nun nenio okazis por forigi tiun mizeron. Ĉiu scias, ke same, kiel por muziko, ankaŭ por studado de fremdaj lingvoj estas necesa speciala talento. Sen tiu talento la lernanto ĉiam restas mallertulo. Spite al tiu tre klara sperto la instruplano tamen postulas, ke ĉiu mezlernejano lernu minimume du fremdajn lingvojn. Ĉu tiuj lingvoj havas tioman edukan valoron, kiel ekzemple matematiko aŭ natursciencoj? Ĉu ili por ĉiuj lernintoj en la venonta vivo estos egale necesaj? Ĉu almenaŭ 10% de lernantoj dum 7—8 jara penado lernas tiujn lingvojn tiom, ke ili povos bone interrilati buŝe kaj skribe kun la koncernaj alinacianoj? Ne, ne, ne, la eduka valoro de la lingva studado estas tre malgranda, ĝi konsistas precipe nur el ekzercado de la memoro, el parkerado de lingvoŝablonoj kaj neregulaĵoj. La angla verkisto Jack London diras en sia fama romano (Martin Eden cap. 13): estas egale, kion vi studas. Vi povas studi la francan, la germanan, au ĵeti ĉion ĉi kaj profundiĝi en esperanton. Vi atingos la saman kulturnivelon. Same vi povas okupiĝi pri la greka aŭ la latina, sed la lastaj neniam utilos al vi por io ajn. Simile juĝis *Darvin, Davy, Faraday, Mayer, Liebig, Helmholtz, Wilh. Ostwald* kaj aliaj.

La devo de la lernejo estas eduki la homon tiel, ke li sciu plenlogike kaj memstare agadi. La nuna lingvoinstruisto efikas la kontraŭon. Ĉar malantaŭ ĉiu lingva regulo staras la neregulaĵoj kaj esceptoj; pro tio la lernanto akiras la konvinkon, ke en niaj praktikaj aferoj logiko kaj reguleco ne estas necesaj, eĉ estas neeblaj. Li akiras nun tiel *danĝeran malestimon kontraŭ ĉiu leĝo*.

Kiom la plejmulto da mezlernejanoj lernas diversajn nacilingvojn, kiujn oni instruas, pri tio ĉio oni povas konvinkiĝi, se oni havas okazon aŭdi, kiel abiturientoj balbutas kun la koncernaj nacioj. Tamen proksimume 10 instruhoroj semajne estas dediĉataj al la por ĉiu deviga lingvoinstruado. Tio sumigas dum 7 ĝis 8 jaroj dum la prepara hejma laborado proksimume 6000—7000 horojn. Tiuj, terure multaj, horoj estas por la plejmulto de la mezlernejanoj tute malŝparitaj, perdita tempo, kvankam ili ofte, ho, tre ofte, kaŭzis multegan penadon kaj nervostreĉan laboron. Pro tio oni rajtas postuli reformon de la mezlerneja plano. Estas kompreneble, ke oni ne povos fari ĝin tiel, kiel oni ŝanĝas ĉemizon. La mezlerneja instruplano lernigas la fremdajn lingvojn, kutime du, sed kial nur du? Ĉie oni devas interrilati kun kvar, ofte kun pli da nacioj. Sed kiu povos lerni tiom da lingvoj? Neniu embaraso, ĉiu nur lernu facilan internacian lingvon Esperanto kaj oni interrilatos kun ĉiuj nacioj de la mondo, ĉar ĉie en eksterlando oni jam ekkomprenis la grandan utilon de internacia lingvo kaj komencis lerni kaj lernigi esperanton. Kiuj nacioj plej frue progresos en tiu afero, tiuj havos la plejan utilon per tio en la internacia trafiko. Oni do ne prokrastu, sed lernu tiun facilan, logikan lingvon, kiun oni povas tute facile eklerni, eĉ sen lingva talento. La lingvoinstruistoj saĝe ekkomprenu tiun avantaĝon, lernu esperanton kaj post unu jaro ili jam povos instrui. Oni memoru, ke

per fremdlingvoj ankoraŭ neniu inventis ion gravan por la homaro. En tiuj aferoj speciale la gepatraro, sed ankaŭ ĉiuj inteligentaj homoj devas helpi, ĉar ili progresigos per tio la propran infanaron. Ĉiu helpu, por ke niaj posteuloj ne diru, ke ni en XX. jarcento estis same malsaĝaj, kiel la homoj antaŭ cent jaroj, kiuj kontraubatalis la fervojon. Ni protektu precipe la interlernejan korespondadon, kiun celis la Paska Konferenco en Praha.

Nur post la tralego de la artikolo ni rimarkis, ke ĝin faris nia plej estimata Samideano Lud. Krysta el Cieszyn.

En la sama N-o *Hispana Suno* publikigas sciigon pri okazonta en Sevilla en 1928 aŭtune VII. Hispana Kongreso de Esperanto, koincide kun la granda Hispana-Amerika Ekspozicio. Samtempe en la belege eldonita N-o estas fotografo de la Sevilla, kongresa urbo.

Ni povas nur bedaŭri, ke la belega Hispana lando estas tiel malproksima kaj ke plejmultaj el ni ne povos ĝin viziti dum baldaŭa Kongreso internacia en Madrid.

La fervojoj en Aŭstralio. Kiam en 1917 la Trans-Aŭstralia fervojo inter Port Aŭgusta en Suda Aŭstralio kaj Kalgoorlie en Okcidenta Aŭstralio pretiĝis por uzado, tiam kunligiĝis la fervojoj de la Orientaj Ŝtatoj kun tiuj de la Okcidenta Ŝtato. La interŝtataj fervojoj, kiuj ebligas surteran iradon inter la kvin ĉefurboj: Brisbane, Sydney, Melbourne, Adelaide kaj Perth, okupas entute distancon de 3,474 mejloj. La tempo por veturo de Brisbane al Perth estas ses tagoj. La plej longa veturo fervoja, kiun oni povas fari en Aŭstralio de Dajarro en Queensland al Meekatharra en Okcidenta Aŭstralio estas 5,499 mejloj (La Fervojisto).

Radio ĉe Canadian National Railways. Inter multaj radio-sendstacioj de Nordameriko okupas specialan lokon la stacioj C. N. R. (Kanadaj). La sendstacioj C. N. R. etendiĝas de la Atlanta Oceano laŭlarĝe tra la kontinento ĝis la Silenta Oceano kaj ĉiuj sendstacioj funkciigitaj de la fervojo, havas la signalon C. N. R. kun aldonita komenca litero de sia loko, krom la lasta Mongton ĉe New Brunswick, kiu havas voksignalon CNRA. Estas menciinde, ke ĉe CNR jam en la jaro 1902 estis akceptataj senfade-naj signaloj en la trajnoj (Fervojisto).

Brazilaj fervojlinioj. La sumo de la nunaj linioj estas: 30.635 km; al la estraro apartenas 23.267 km, al diversaj ŝtatoj 7.368 km. (Fervojisto).

XII. Esperanta Itala Kongreso en Napoli 3—8 septembro sub la gvidado de: S-ro P-ro *Nikola Magliulo*, Delegito por la organizo: S-ro Admiralo *Eugenio Trifani*, Prezidanto, P-ro *Alfonso Chierchia*, vicprezidanto, D-ro *Tammaro*, D-ro *Tito Mirengi*, Sekretarioj, P-ro *Salvatoro Montuori*, D-ro *Luighi Miraglia*, Kolonelo *Porcelli*, Fortunato *Cappabianca*, P-ro *Francisko Cavallaro - Saitta* (L' araldo Esperantista).

* * *

Kazys Vidikauskas, Litovano, sendis al la Redakcio de Philadelphia (Usono) varmegan memorskribon pri antaŭ nelonge mortinta D-ro *Johano Basanowicz*, kiu 16/II. 1927 mortis en Wilno. Ĉiuj Litovanoj treege amas kaj ŝatas tiun veran Reviviĝinton de Litovujo. Oni ja scias, ke post lia morto Wilnanoj: Poloj kaj Litovanoj honoris profundkore lian memoron, enterigante lin kun reĝaj honoroj.

POLLANDA KRONIKO.

Dum la Danziga Kongreso S-ro Univ. Prof. Nowakowski el Poznań iniciatis kunvenon de pollandaj kongresanoj el Okcidenta Polujo; oni priparolis vigligon de la esp. movado.

BORYSLAW. Post la XIX. multaj eksterlandaj gesamideanoj vizitis diversajn urbojn de Polujo. Areto da ili konsistanta el 11 personoj sub gvido de Pastro Wachowski vizitis ankaŭ nian urbon. Ili estis akceptataj kaj helpataj de urbaj-autoritatoj. Gastoj vidis diversajn minejojn, fabrikojn kaj ankaŭ la plej proksiman banlokon Truskawiec, kien ili veturis per senpage al ili disponigitaj aŭtomobiloj.

KALISZ. La ĉi-tiea esperantema semajna proleta gazeto „Prawda“ (La Vero) enkondukis nune konstantan esperantan fakon, en kiu ĝi pritraktos pli gravajn sukcesojn en la esperanta movado ktp. En tiu ĉi gazeto ni trovas ankaŭ komunikon pri kursoj okazontaj en Kalisz en la plej proksima tempo.

KATOWICE. La 4/IX. okazis sur la monto „Stożek“ en ĉirkaŭaĵo de Katowice dua silezia distrikta konferenco de P. E. D. Pli detalajn informojn ni donos en plej proksima numero de PE.

OSTROŁĘKA. La 24/VII. komenciĝis kurso kun 10 partoprenantoj. Gvidas ĝin ĉi-tiea UEA-delegito S-ro M. Jagoda.

WARSZAWA. La 28/VIII. okazis en Warszawa tutlaborista akademio pri „Esperanto kaj lernejoj“. Reprezentitaj estis politikaj asocioj, profesiaj unuiĝoj kaj multaj organizaĵoj sociaj kaj klerigaj.

Dank' al klopodoj de s-o apotekisto Zambrzycki fakaj varsoviaj gazetoj „Wiadomości Farmaceutyczne“ (Farmaciistaj Sciigoj) kaj „Kronika Farmaceutyczna“ (Farmaciista Kroniko) presigas en ĉiu numero esperantajn artikolojn.

ZAKOPANE. Kelkaj eksterlandaj esperantistoj post Gdańsk venis ankaŭ al „somera ĉefurbo“ de Polujo por ripozi post urbaj bruoj kaj tumulto en mirega beleco de l' montoj. Estis: ges-oj Setälä el Finnlando, Balkanyi k. Tolnai el Hungarujo, D-o Canuto k. D-o Roccavilla el Italujo, Helsing el Svedlando kaj s-ino Ledel el Germanujo. Tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo gvidis ilin s-ino Mikoszevska kaj s-oj Kaciczak (loka UEA-delegito) k. Ziomek.

K R O N I K A Z A G R A N I C Z N A.

Z MIĘDZYNARODOWYCH KONGRESÓW. Okres letnich urlopów i wakacyj jest zawsze wyzyskiwany na liczne międzynarodowe kongresy. Z pośród tegorocznych większem zrozumieniem dla esperanta, jakoteż jego praktycznem zastosowaniem wyróżniły się oprócz oczywiście XIX Kongresu Esperantystów w Gdańsku:

MIĘDZYNARODOWY ZJAZD MŁODZIEŻY WE FREUSBURGU. Odbył się on w dniach 30/VII—7/VIII we Freusburgu (Nadrenja, Niemcy) i poleciał swym członkom naukę esperanta, jako jedynego środka porozumienia się na kongresach. Z biorących udział w zjeździe wyróżniła się amerykańska delegacja pięknym esperanckim sztandarem. Delegat czeski zaś omawiał sprawę wielkanocnej konferencji wychowania pokojowego w Pradze, która

obradowała wyłącznie po esperancku. Na wystawie zjazdowej był dział esperancki, zawierający różne książki, gazety i inne wydawnictwa esperanckie.

XII MIĘDZYNARODOWY ZJAZD STENOGRAFÓW. W Brukseli (Belgja) miał miejsce od 4 do 7/VIII Międzynarodowy Zjazd Stenografów, w którym brał również udział Międzynarodowy Związek Stenografów-Esperantystów (IAES). Do obrad jednej komisji zostało oprócz języka francuskiego wprowadzone esperanto. I okazało się, iż jeno w tej komisji mogła rozwinąć się istotnie swobodna i ożywiona dyskusja. Również na plenarnym posiedzeniu Zjazdu rozprawiano po esperancku. Przemawiało siedmiu mowców z różnych krajów. Na skutek tych prób oraz referatu p. Flaguel'a: „Stenografja i Esperanto“, Zjazd uchwalił rezolucję, zalecającą naukę esperanta i tworzenie kół esperanckich stenografów. Na wystawie zjazdowej IAES zdobył złoty, a esperancki stenosystem „Progresema“ srebrny, medal.

ESPERANTO W SZKOŁACH. Bezprzecznie jednym z najważniejszych sposobów ogólnego zwycięstwa esperanta — jest powszechna jego nauka w szkole. Z zadowoleniem możemy podać nowy postęp w tej dziedzinie. A mianowicie dnia 18/VII br. rząd Saarterytoryum (położonego między Francją a Niemcami) wydał następujące pismo do wszystkich dyrektorów szkół średnich i wyższych: „Zgadząmy się, ażeby esperanto było wprowadzone jako nadobowiązkowy przedmiot nauczania w szkołach wyższych i średnich. Gdzie znajdują się odpowiedni nauczyciele, tam wprowadzenie to może nastąpić już w obecnym roku szkolnym. Polecamy zaprowadzić roczne kursa, obejmujące dwie godziny nauki tygodniowo w jakiejś klasie średniej, naprzykład w drugiej klasie niższej („Untersekunda“ — odpowiadająca naszej kl. VI gimnazjalnej). Kurs dla nauczycieli jest w przygotowaniu“.

Sław.

ONI ALSENDIS AL LA REDAKTEJO: — NADESŁANO DO REDAKCJI:

1) *Demokratischer VII Internationaler Friedens-Kongress* von 3-11 September 1927.

2) *Monata Bulteno de Societo Esperanto Bydgoszcz* N. 3-4.

3) *EPA Bulteno de Esperanta Presa Agentejo* N. 4.

Direktoro *St. Essigman*, Warszawa, Marszałkowska 130 Pollando.

4) *La Suno Hispana, Aŭgusto* N. 123 Direktoro *M. Capliure*.

5) *Sennaciulo 13 Aŭgusto* N. 151 — Gvidanto: *E. Lanty, Paris*.

6) *Raporto de l' Aerologia Observatorio de Tateno apud Tutiura*, Nr. 1. (Ibaraki-ken) Japanujo.

7) *L' araldo esperantista »esperantheroldo«* Direktejo: *Arezzo* Italujo, *Via Vittorio Veneto*.

8) *La Fervojisto. Oficiala organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj*. Monata revuo pri fervojo N. 5-6. Redaktoro *Ilija Puhalo*, Zagreb (Jugoslavio).

9) *Gvidlibro tra Pollando. Eldono de la Pollanda Esperanto Delegitaro*.

10) *Heroldo de Esperanto* Nr. 33, 34, 35.

11) *Fr. Dąbrowski*. La kooperativa movado en Polujo. Esperanta resumo.

12) *Ferd. Hirt u. Sohn*, Leipzig. Literatura informilo N. 4.

13) *Edmond Privat*. Historio de la lingvo Esperanto. *F. Hirt u. Sohn*.

14) *A. Delsudo* kaj *Lauro Laiho*. Aŭstralio, lando kaj popolo. *Ferd. Hirt und Sohn*.

- 15) *Argentina Esperantisto*, Junio—Julio, N-o 13—14. Buenos Aires.
- 16) *Germana Esperantisto*, Aŭg.—Sept. N-o 378—379. Berlin.
- 17) *Prawda (La Vero)*, N-o 3, Kalisz 149.
- 18) *La Socialisto*, N-o 9. Wien.
- 19) *La Movado*, Aŭgusto—Septembro. Direktoro: Emile Houbart, Paris.
- 20) *Aŭstria Esperantisto*, Redaktoro: Hugo Steiner, Kornenburg b. Wien.
- 21) *Esperanto Katalogo*, Julio 1927, Rudolf Mosse, Berlin.
- 22) *Katolikaj Kantoj*, kolektitaj de Leopold Chiba. Wien.
- 23) *Eugen Wüster*. Zamenhof-radikaro. F: Hirt u. Sohn. Leipzig.
- 24) *Prof. Dr. Johann Reinke*. Naturscienco Mondkoncepto Religio. Katolika Mondo-Koeln.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

Redakcio respondas skribe nur ricevinte la poŝtmarkon por respondo. Redakcio ne resendadas la manuskriptojn. — Manuskriptoj ne maŝine skribitaj estos nur escepte presigataj.

Subskribojn en viaj leteroj skribu tre legeble: la plej taŭga maniero estas fari subskribon per *pres-literoj*.

S-no *Svirtun*, Łuck: artikolo estas bona, sed pro manko de loko bedaŭrinde ni devas prokrasti.

S-ro *Stef. Wojtkiewicz*, Laŭeble presigota. Bonvolu atendi. Jam de longe kuŝas en la redakcejo multaj manuskriptoj, sed bedaŭrinde pro manko de loko, aŭ pro troa amplekso, ili devas atendi. Laŭeble ni ĉerpas el tiu fonto.

Al s-ro Abonanto, kiu esprimas koran dankon al la Gazeto, »ĉar per tiu gazeto mi multe perfektigis en nia kara lingvo«, sed ĉesas aboni. Ni ankaŭ estas dankaj por Via bona opinio. Ĉu vi laŭdus iun, kiu jam satiĝinte, ne pli zorgas pri manĝujo, kiu plaĉis nur dum la manĝo?

S-ro *L. Krysta*. Ĵus mi transdonis al la presejo Vian korespondaĵon el la Suno Hispana. Ni estas tre dankaj por Via kritiko de nia Gazeto kaj ni penas kontentigi Vin. Ankaŭ Viaj artikoloj presiĝos. Via alvoko al la fumantoj estas laŭdindega, kiel memekkono. Oni demandas, kial mi fumas? Oni respondas, ĉar mi havas superfluan sanon kaj devas klopodi forigi ĝin, kiel eble plej baldaŭ. Mi havas ankaŭ superfluan monon kaj mi opinias, ke estas plej logike per fumo blovi ĝin aeren. Estas ankaŭ menciinde, ke mi havas superfluan tempon kaj ne scias pli inteligentan tempopasigilon ol produkti fumnubojn. Fine, mi jam komencis fumi kaj ne estas suface forta, ĉesigi tiun teruran kutimon.

S-ro *Michał Demidowicz*. Pro manko de loko ni ankoraŭ ne presigis vian interesan priskribon de viaj travivaĵoj.

S-ino *E. Koźnek*, Dąbrowa Górnicza: Ne korekte skribita.

Nia Redaktoro S-ro B. Kuhl pro sia oficiala faka laboro devas foresti de Krakovo kaj ne povas redaktadi la Gazeton. Provizore prenis sur sin tiun ĉi taskon Prof. O. Bujwid, kiu komencante de tiu ĉi numero gvidos la Gazeton. Adreso de la redakcejo kaj administrejo de nun estos: Kraków, Lubicz 34.

BILANS KASOWY

Komitetu Organizacyjnego Pielgrzymki do Warszawy po XIX Wszechświatowym Kongresie
Esperantystów w Gdańsku.

W P Ł Y W Y.

Opłata kongresowa za 342 osoby 1808,95 zł.

Razem	1808,95 zł.
Deficyt	0,07 zł.
	1809,02 zł.

W Y D A T K I.

Księgowy — Sekretarz techniczny	220,00 zł.
Wydatki pocztowe	128,47 „
Chór	450,00 „
Druki	215,35 „
Koncert w „Dolinie Szwajcarskiej“	150,00 „
Dekoracja grobu d-ra Zamenhofa .	175,00 „
2 wieńce *)	145,00 „
Opłata dodatkowa za 259 obiadów**)	129,50 „
Tramwaje dla uczestników Kongresu	80,00 „
Za włożenie do „Heroldo“ deklaracji	26,20 „
Strata na kursie	25,90 „
Książki kasowe, papier itp. . . .	19,75 „
Plakat Pielgrzymki	15,00 „
Wydatki różne	27,85 „
	1809,02 zł.

Razem 1809,02 zł.

Stanisław Essigman.

Za zgodność: ksiązkowy i sekretarz techniczny (—) *I. Dratwer.*

*) Wieńce zostały złożone w imieniu XIX Wszechświatowego Kongresu Esper. **) Na polepszenie wspólnego obiadu.

A D M I N I S T R A C I A J S C I I G O J.

I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de P. E. pagis jam:

P-o D-o Bujwid por VIII. — 30 zł., por IX. — 30 zł.; D-o Dzedzie — 10 zł.; S-ro Emiljan Loth (Pabjanice) — 100 zł.; S-ino Neuberg por VI. — 10 zł., por VII. — 10 zł.; D-o Róbin por VII. — 20 zł.; D-o Rosenstock por VII. — 10 zł. por VIII. — 10 zł.; F-ino Wieler — 5 zł.

II. GARANTIA ĆENO DE »POLA ESPERANTISTO«.

- 1 Fraŭlinoj M. A. Szenfeld pagas 6 zł.
- 2 D-o Fels kun edzino pagante 10 zł. alvokas s-inojn: Baum, Dąbrowska kaj Hescheles (ĉiuj el Lwów).
- 3 S-o Aron Fisz pagas 2 zł. kaj alvokas el Sosnowiec fraŭlinojn: D-o Pachter, Kożuch, Majerkiewicz, Gutman kaj ambaŭ Klajman.
- 4 S-o Stanisław Głuchowski pagas 4 zł.
- 5 S-o Jan Datko pagas 2 zł.
- 6 S-o Jan Fajłek pagas 5 zł.

!! V I V U S E K V O N T O J !!

III. NIAJ REPREZENTANTOJ EN BIAŁYSTOK, KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo: en Białystok al „Esperanta Societo Zamenhofa“, str. Zamenhofa 12a; en Katowice al „Societo de Esperanto Amikoj“, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4; en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9